

Oomoto

1
9
7
7

jan.-jun.

Por Paco kaj Unueco


Kiotaro Deguĉi
Prezidanto de Oomoto

Oomoto naskiĝis la Secubunan nokton de la jaro 1892, kiam Nao Deguĉi spirite kaj korpe eniris en posedon de la Prapatra Dio de la Mondo, kaj deklaris reformon de la mondo, por savi la tutan homaron el la minacanta pereco.

Tial, ĉiujare, ni Oomotanoj celebras la Secubunan nokton per Granda Festo, en kiu ni jubilas la "Duan Aperon" de la Prapatra Dio post la eona "eklipso", kaj ĵuras sindonan servon kaj laboron por la Sankta Afero de monda "rekonstruado" laŭ Lia volo. "La Granda Festo de Secubuno", iam diris Onisaburo, "estas tiel grava por la Oomotanoj, kiel la Festo de Pasko por la Kristanoj".

Ĉi-jare, tiu grava festo de Oomoto okazis la nokton de la 3a tago ĝis en la mateno de la 4a de februaro (1977). Sed ĉi-jare, en la antaŭtago de Secubuno ni havis la unikan eventon de Kristana Diservo: la Episkopa liturgio kun la preĝa rito de la "Kiso de Paco" estis celebrata antaŭ la Sankta Kruco el kameciparo (japana ligno), starigita sur la altaro de la Plejsanktejo de Oomoto en Ajabe; en ĝi oficis, kiel ĉefcelebranto, la Tre Reverenda Dekano James Parks Morton el Usono, kaj la Preĝejan Halon plenigis multe da Oomotanoj, Kristanoj kaj eminentaj reprezentantoj de la diversaj aliaj religioj.

Oomoto kaj la Episkopa Eklezio nun komunigis la sanktan lokon por sia celebrado, kaj tiel faris unuan paŝon direkte al la monda paco kaj unueco



Oomoto

Oficiala organo de OOMOTO kaj UHA, Kameoka,
Kioto-hu, 621 Japanujo. *Telefono* : (07712)-2-5561
Fondita en 1925 N-ro januaro-junio, 1977

Redaktoro : T. Nakamura

Helpredaktoro : N. Esumi

Presejo : Tenseiŝa kaj K-io, Kameoka.

Abonprezo : 1200 enoj jare,

pagebla per la poŝta ĝirkonto : Kioto 25637, aŭ abonebla ĉe UEA.

per interreligia kunlaboro. D-ro Haĉiro Juasa, Eks-Prezidanto de Internacia Kristana Universitato, kiu ĉeestis la solenon, alte taksis nian paŝon kiel “sanktan aventuron”, kaj alvokis memobservon de ĉiuj religioj, kaj sugestis, ke ili, respekte observante siajn doktrinon kaj tradicion interne, metamorfozu parton de si por interreligia kunlaboro, ĉar ilia misio estas por la savo kaj paco de la tuta homaro.

La amikeco inter Oomoto kaj la Episkopa Eklezio en Usono naskiĝis ne hieraŭ. En 1972, kiam ni celebris la 80-jaran datrevenon de Oomoto, ni entreprenis la okazigon de Artekspozicio de Onisaburo kaj Lia Skolo ĉirkaŭ la mondon; en 1975, kiam ni alvenis en Usono, la grandanima Estraro de la Katedralo de la Sankta Johano en Nov-Jorko, kaj de la Katedralo Graco en San-Francisko, ne nur akceptis kaj patronis la okazigon de nia Artekspozicio, sed ankaŭ permesis al ni ĝin inaŭguri per la Ŝintoa Diservo de Oomoto, en la nomitaj Episkopaj Preĝejoj, respektive. Tiel nia Artekspozicio (kiu daŭris tri jarojn en Eŭropo, Kanado kaj Usono) fine alportis, kiel frukton, la grandan amikecon interreligian. Nia amikeco ĉiam pli kreskis, kaj ni invitis, ĉi-foje, Dekanon Morton por reciproki la amikecon kaj kunlaboron per okazigo de la Episkopa liturgio en Oomoto. La Kristana-Oomotana soleno de paco kaj unueco estis treege impresa kaj vekis intereson de la granda publiko, kiel bela ekzemplo de interreligia kunlaboro por la tutmonda paco, ĉar en ĝi estis nuligita unu el la plej fortikaj kaj obstinaj baroj, — tiu inter du malsamaj religioj.

Onisaburo iam diris: “Por ke la eterna paco de la mondo estu starigita, antaŭ ĉio estu forigitaj la baroj palpeblaj kaj nepalpeblaj, kiuj staras alte en la mondo. La plej grandaj el ĉiuj palpeblaj estas la nacia armado kontraŭekstera (ne tiu de enlanda polico) kaj la ĉirkaŭbarado de la naciaj teritorioj. Kaj la plej grandaj el ĉiuj nepalpeblaj estas tiuj, kiuj staras kiel inter la rasoj, tiel ankaŭ inter la religiaj organizoj. Por forigi la plej grandajn barojn palpeblajn, necesas unue, ke la plej grandaj baroj nepalpeblaj estu forigitaj”.

Ni faros pliajn paŝojn en tiu direkto: sub la gvido de la Sankta Spirito ni kunlaboros por krei favoran klimaton por pli da kompreno kaj toleremo inter religioj.

Foteraporto

pri la Kristana Soleno


en la Rita Centro de Oomoto

Profunde kortuŝa evento estis la solenado de l' Episkopa liturgio, kronita per la Kiso de Paco, kun ĉ. dumil komunaj kunfestantoj en la Granda Preĝejo de Oomoto, Ajabe. Ĝi okazis en la kadro de la Secubuna Festo de Oomoto, la 3an de feb. 1977.

Temis pri la pionira aŭ aŭdaca provo de interkultura kompreno kaj interreligia kunlaboro por tutmonda paco, — provo komencita per fratama kaj bonvola gesto reciproka por ekumena movado, ne tia, kiel inter Kristanaj diversekleziaj komunumoj mem, sed tia senprecedenca, kiel inter la Episkopa Eklezio en Nord-Ameriko kaj Ŝintoa Oomoto en Japanujo. Kaj la provo farita jam montriĝis sukcesa; ĝi fariĝis historia fakto de unika ekzemplo de tutgloba ekumenismo.

Multaj el la japanaj naci- kaj anglalingvaj ĵurnaloj faris tre favorajn kaj kuraĝigajn raportojn pri tiu epokfara evento. Unu renoma studio de televido pretigis dokumentan filmon pri la solenajo — proprakoste.

Pri la post-eventaj planoj kaj programoj (kelkaj el kiuj jam efektivigis) oni legos en niaj sekvantaj numeroj.





La Kiso de Paco : Dekano Morton kaj Pastro Sekimoto brakumas unu la alian.



La litanio

La pastroj marŝas
inter la partoprenantoj.





↑
*La graco de nia
 Sinjoro Jesuo
 Kristo, kaj la
 amo de Dio, kaj
 la fratularo de l'
 Sankta Spirito,
 estu kun ni ĉiuj
 por eterne.
 Amen.*





Prediko de la Celebranto,
tradukata de Pastro
Sekimoto japaner

Himno: *Kiel feliĉaj
estas tiuj, kiuj scias
sian bezonon de Dio:
la regno de la ĉielo
estas ilia.*



Post la Diservo salutas la Celebranto,
kaj poste D-ro Juasa (sidanta en la foto).






Okaze de la Secubuna Diservo Dekano
Morton kaj lia edzino respektive oferas
pin-branĉeton, simolan oferaĵon,
al Dio laŭ la rito de Oomoto.




← La kruco estas starigita sur la altaro antaŭ la Plejsanktejo de Oomoto.

La Celebranto de la Kiso de Paco brakumas familianojn de Deguĉi unu post alia.



→
La Celebranto
benas la
ĉeestaron.



↓
Eminentaj
reprezentantoj
de diversaj
religioj ĉeestas
la celebradon.





Ges-roj Morton ĝuas teon en la teĉambro Taian-kjo, Kameoka.

Ili estis bonvenigataj al Kameoka, tri jarojn post kiam ili varme akceptis multajn oomotanojn en Nov-Jorko.





Dum sia gastado
ĉe Oomoto, ili
vizitis la Oran
Pavilonon kaj
aliajn vidindaĵojn
en Kioto.

Sankta Aventuro

D-ro Haĉiro Juasa
Eksprez. kaj Emerita Prof. de
Internacia Kristana Universitato

La homaro nun vivas en epoko senprecedenca en la plurmilionjara evoluhistorio de la homa raso. Laŭ la scienca vidpunkto ĝi estas kosma epoko ; laŭ la kultura, ĝi estas planeda epoko. Ĉar tia estas nia tempaĝo ĝi devigas nin fari reekzamenon kaj retakson pri la signifo kaj valoro de ĉiuj ekzistantaj establaĵo, aŭtoritato, normoj, kutimoj, ktp. La demando do ne rilatas sole al Oriento aŭ Okcidento, nek sole al la evoluantaj zonoj aŭ la evoluantaj, sed ampleksas la tutan homaron sur la tero.

La realo, kiun la homaro frontas, estas rigora kaj kriza, kaj por trovi radikalan solvon de la demando ĝi postulas, ni devas diri, tian religion, kia respondus al la intelekta, racia, senta, morala kaj spirita bezonoj de la modernaj homoj. Ĉar la religio esence devas enteni la eternan veron, kiu faras la homan vivon signifplena kaj vivinda.

Sed tia religio postulata de nia planeda epoko ne nepre estas tiu aŭ alia aparta eklezio, aŭ sekto, de la ekzistantaj grandaj religioj: Hinduismo, Budhismo, Kristanismo, Islamo, ktp, sed ĝi devas esti *tuthomara* religio, kiu transcendas la diferencon de la rasoj, naciecoj, tradicioj, kredoj kaj politikaj reĝimoj.

Se tia konsidero estus akceptebla, necesus, ke la ekzistantaj religioj submetu sin al humila memobservo kaj severa memkritiko, celante al reciproka kompreno kaj kunlaboro, kaj metamorfozu parton de si por *interreligia* unuiĝo.

Hodiaŭ la unuan paŝon al tia interreligia unuiĝo oni faris antaŭ niaj okuloj per la celebrado de Kristana diservo en la Sanktejo de Oomoto. Ĝi vere estas io profete-pionira — evento epokfara. Ni povas nomi ĝin sankta aventuro. Kiel japano, kiu subtenas la ideon por interreligia kunlaboro, mi esprimas mian plej altan estimon kaj dankon al Reverenda Dekano Morton kaj la Gvidantoj de Oomoto pro ilia kuraĝo, saĝo kaj akravideco.

Mi tutkore esperas, ke tiu ĉi ekzemplo sekvigos aliajn en la mondo: la diversaj religioj, konservante kun respekto siajn proprajn doktrinon kaj tradicion, kaj akceptante la postulon de la nuna epoko, pozitive kontribuos per interreligia kunlaboro por efektivigi la tutmondan savon kaj pacon, kiun atendas ĉiuj homoj sur la tero.

Apartan dankon al ĉiuj miaj amikoj de Oomoto!

La signifo de nia Nova Alvokiĝo

Dekano James P. Morton

Katedralo de la Sankta Johano, Nov-Jorko

La estado de Kristana Liturgio ĉe la Secubuna Festo de Oomoto, celebrata de la Dekano de Katedralo de la Sankta Johano en Nov-Jorko kaj asistata de tri pastroj kaj unu seminariano de la Japana Episkopa Eklezio, estas historie grava momento pro kvar kaŭzoj. Unue, ĝi simbolas interreligian amikecon — amikecon inter du religiaj grupoj vizitantaj sin reciproke: ni ne plu estas fremdaj unu al la alia, sed anoj de la sama familio. Due, ĝi estas internacie grava, ĉar tiuj du amikoj vivas sur la kontraŭaj flankoj de la terglobo, parolas malsamajn lingvojn kaj venas el malsamaj kulturoj. Trie, ĝi estas rimarkinde grava, ĉar ĝi substrekas la bazan naturon de la hodiaŭa mondo, kontraste alian, ol la hieraŭa; kvankam ni loĝas sur la malaj flankoj de la terglobo, ni estas nur 10 horojn apartaj unu de la alia; niaj urboj estas plenaj de niaj respektivaj homoj kaj komercoj; efektive, ni dividas la saman tre malgrandan mondon, ĉiu el ni loĝas en la postdoma korto de la alia, kaj kion ajn ni faras, tio profunde influas nin ekonomie, politike, socie kaj kulture. Ni vere dependas unu de la alia. Kaj kvare, plej grave, religie: hodiaŭ ni servas al Dio kune kaj per tio deklaras antaŭ Li, ke ni estas fratoj kaj fratinoj, gefiloj de la sama Sankta Patro. Ni interŝanĝas la Kison de Paco kaj per tio manifestas je la plej profunda nivelo nian Unuecon.

Se hodiaŭ estas tago de trarompo, ĝi estas ankaŭ pensoprovoka treege por la venontaj tagoj. Se hodiaŭ ne estas hazardo, sed parto de la Dia plano, tiam kion Dio volas, ke ni rivelu?

Ŝajnas al mi ke ĉi tiu Dia alvoko, kiu ligas Kristanan Eklezion kaj Oomoton, konsistas el tri elementoj. Unue, kion komunan ni dividas religie? Due, la unika donaco, kiun ĉiu el ni alportas. Kaj trie, kien ni iros de ĉi tie? Kio estos nia komuna tasko en la venontaj tagoj?

Do, unue, kion komunan ni — Kristana Eklezio kaj Ŝintoa Oomoto — havas? Ni kunhavas la plej gravan en la tuta mondo. Ni kunhavas la Unu Sinjoron, la Plejpotencan Dion, la Kreinton de la mondo kaj de la tuta vivo. Ni kunhavas la Grandan Originon kaj Fonton de la Komenco kaj de la Fino. Se ni vere kunhavas Dion, ĉio cetera paliĝas kompare. Se Dio estas por ni, kiu povus esti kontraŭ ni? Pripensu, miaj fratoj kaj fratinoj,

kion tio signifas. Se ni kredas je la Unu Sinjoro, la Dio de ĉielo kaj tero, kiu estas la Kreinto de ĉiuj homoj kaj de ĉiuj aferoj, tiam ni komune havas religian mondrigardon, ne la nuntempan sekularan kaj materialistan mondrigardon, kiu metas la homon plejsupre; ni kredas je fina universalismo. Ĉar Dio estas la Dio de ĉio, ĉiuj homoj devas esti fratoj; se ĉiuj homoj estas fratoj, ni devas esti respondecaj unu por la alia, aparte zorgemaj pri la farto de la malriĉaj kaj malsataj kaj senhejmaj en la mondo, al kiuj estas rifuzataj ilia porcio da nutraĵo de Dio kaj ilia parto da ŝirmejo de Dio. Se nia mondo estas la mondo de Dio, Lia volo kaj Lia vero devas esti alte tenataj kaj pruvataj. Ni ambaŭ distingas justecon disde maljusteco, ni kredas je la etiko kaj valoroj. Kaj se Dio estas Dio, la fakto, ke ni ne estas samaj, ke ni estas malsamaj, estas pro Dia faro. Se Dio estas nia Sinjoro, vi kaj mi devas respekti unu la alian, kun tiaj diferencoj, kiajn ni havas, ĉar Dio kreis nin kiel du malsamajn personojn, kaj la libereco estas la sola maniero, laŭ kiu ni povas vivi pace unu kun la alia. Se Dio estus kreinta nin identaj, tiam la vorto libereco havus nenian sencon. Kaj fine, ĉar Dio estas nia Sinjoro, ni ambaŭ ricevis la kapablon rigardi la veron perspektive. Ni fojfoje ekvidas, kiel malgrandaj ni estas, kaj kliniĝas, kovrante al ni la vizaĝon, en humileco. Se ni ambaŭ vere konas Dion, ni povas koni nin kaj kompreni, al Kiu apartenas ĉi tiu mondo. Miaj amikoj, ni dividas la plej gravan el ĉiuj. Jen kion mi volas akcenti antaŭ ĉio.

La dua afero koncernas niajn diferencojn. Kian unikan kontribuon ĉiu el ni povas alporti al tiu ĉi nova alvokiĝo de ni ambaŭ? Kion vi de la Ŝintoa Oomoto alportas, diferencon de tio, kion ni de la Usona Episkopa Eklezio alportas?

Unue vi alportas la koncepton pri la “malpleneco”, kiu ne estas nega-

La Tre Reverenda James Parks Morton, Dekano

La Katedralo de la Sankta Johano (*The Cathedral Church of St. John the Divine*), **Nov-Jorko**

Li estis naskita en Teksaso la 7-an de Januaro 1930. Li kreskis en Iowa kaj studis ĉe Harvarda Universitato. Fininte la studon tie, li iris al Anglujo kaj studis ĉe Kembriĝo du jarojn. Li studis teologion en Usono kaj en 1954 fariĝis pastro kaj la direktoro de la Ĉikaga Urba Trejnejo por Kristana Misio. En 1972 li estis enoficigita kiel Dekano de la Katedralo de la Sankta Johano.

tiva. Vi alportas *jin* kaj *jang*, vi alportas la nigrainkan kaligrafion sur blankan paperon kie la nigro kaj blanko bezonas unu la alian por sia kunestado. Kaj kiel rezulton de via akcentado je kontrasto, vi alportas specialan atenton al la “aparta”, al la unikeco de ĉiu ero de herbo, al ĉiu ŝtoneto en ĝardeno, al ĉiu streko de pentropeniko. Se diri per lingvaĵo de zeno, vi alportas al ni la “tieleco”n de ĉio, kio estas kreita. Vi diras al mi ke nenio okazas akcidente, kaj ke ĉiu momento de la vivo estas miraklo. Vi parolas al mi pri mistero kaj la mistika, kiu riveliĝas en ĉiu momento, kaj sekve, pri la sankteco de ĉiu momento. Vi alportas novan profundon al la komprenado pri la sankteco de la kreado, pri la sankteco de la naturo, pri la sankteco de la mondo. Kaj trie, vi parolas al mi en freŝa maniero pri la sankteco de arto. Pere de vi, mi iĝis kapabla vidi arton kiel la grandan simbolon de kreado mem, arton kiel tiun rimedon, per kiu oni povas rigardi la vivon mem perspektive. Vi alportas grandan kontribuon al nia komuna alvokiĝo per tiu unika diro, ke arto kaj religio estas unu.

Kaj kion ni de la Kristana eklezio alportas? Se vi alportas grandajn kontribuojn al la komprenado pri la naturo, pri la sankteco de arto, kaj pri la graveco de rito kaj formo en la vivo, la Kristana Eklezio montras, kiel Dio agas en la historiaj eventoj en formo de la leviĝoj kaj malleviĝoj de nacioj kaj en la vivoj de individuaj homoj. Dio dismalfermis Sian koron al ni kaj montris al ni, ke Lia naturo estas la boneco kaj prizorgado kaj amado. Dio faris ĉion, kion Li povis, Li nenion domaĝis — ne eĉ Sin mem — por montri al ni la valoron de amo kaj sinofero. Eble oni povas diri, ke, se vi montris pli profunde, ol iu ajn alia, la Dian estaĵon per kreado, per arto kaj per la naturo mem, la Kristana eklezio montris la esencon de Dio per la homa personeco. Ĉu ne, tiurilate, troviĝas ia alproksimiĝo inter ni ambaŭ, ĉar ankaŭ vi de Oomoto prenas vian apartan vivstilon karakterizan el la vivo de Fondintino Nao kaj Onisaburo, el la maniero, laŭ kiu ili respondis al la Dia revelacio, kaj al la persekutado, kiun ili suferis? Tiu ĉi emfazo sur la unika maniero de homa respondo al la alvoko de Dio estas la plej granda kontribuo kaj nekredeble granda forto de Kristanismo — ĉar Kristanismo kredas, ke la ĉiopova Dio, la Origino kaj Fonto de la tuta kreitaĵaro fariĝis mem homa estaĵo kaj vivis kaj suferis kaj mortis sur ĉi tiu tero, tute same kiel ĉiu el ni homoj. Plie, la kontribuo estas la vivanta ĉeesto de Dio, kaj sankta kaj homa, alpaŝebla por ĉiu persono hodiaŭ. Dank’ al la perfekta homeco de Jesuo ĉiuj homoj nun povas partopreni en la komunio kun Dio kaj unuj kun la aliaj. Tio estas nia donaco.

Kaj fine, kien ni de Oomoto kaj de Kristana eklezio iros de ĉi tie?

Ne eblas fari rapidan kaj facilan respondon. Neniu el ni deziras formi alian eklezion: ni jam havas tro multajn ekleziojn. Mi ne kredas ke la respondo kuŝas je institucia aŭ organiza nivelo. Ni prefere devas pli bone

taksi, kion ni jam kunhavas, kaj fariĝi pli atentaj rilate la unikajn kaj malsamajn kontribuojn, kiujn ni alportas unu al la alia. Se ni diras ke ni estas fratoj, tiam ni devas koni nin pli intime, por ke ni komprenu el konkreta sperto, kiel multe ni bezonas unu la alian, kiel multe ni bezonas la kontribuojn unu de la alia por nia pluvivado. Ni estas fratoj kaj fratoj estas du malsamaj personoj, kaj tamen ni fratoj estas de la sama sango kaj dividas la saman heredon, kaj estas pretaj fordoni ĉion unu al la alia — eĉ se tio kostus al ni la vivon. Tio ĉi, miaj fratoj, estas la vera frateco. Kaj tiun fratecon je la plej profunda kaj intima nivelo ni ĵus ĵuris per la Kiso de Paco.

Se Secubuno markas la komencon de printempo post longa vintro, tiam Secubuno mem estas la Dia maniero sciigi al ni, ke la sezono por nova vivo kaj kreskado kune en la varmo de Lia universala suno estas antaŭ ni, ekde hodiaŭ.

Gratulon pro la Kristana Diservo ĉe Oomoto

Naohi Deguĉi
Gvidantino de Oomoto

“La Supera Mondo disvolviĝos en plena florado samtempe, kiel ume-floroj. La mondo estos rekonstruita por la regado de Dio”. Ĉi tiu Dia promeso rekonstrui la mondon en la Regno de Dio estis eldirita al ni la unuan fojon ĝuste je la tago de Secubuno en 1892.

De tiam Oomoto, kiu servas al la Sankta Afero rekonstrui la mondon, strebadis al paco kaj al purigado kaj reformado de la mondo per la sindonaj zorgoj de Fondantino Nao kaj Majstro Onisaburo, kaj sub ilia protektado.

Hodiaŭ ni celebras la Secubunan Feston de Oomoto. Je ĉi tiu destinita tago, ni havas la honoron akcepti inter ni la Tre Reverendan Dekanon James Parks Morton kaj S-inon Morton el Usono. Kaj sub lia celebrado la Kiso de Paco, unu el la plej antikvaj formoj de Kristana rito estis plenumita, kun Sankta Kruco lokita sur la Altaro de la Mirokuden-Sanktejo de Oomoto en Ajabe. Ni sincere dezirus, ke ĉi tiu historia evento donus inspiron ekzemplon de religia unueco al la mondo por paco.


Ankoraŭ freŝa estas nia memoro pri la Arta Ekspozicio de Oomoto,

kies okazigon en Nov-Jorko antaŭ du jaroj Dekano Morton akceptis en la Katedralon de la Sankta Johano, kaj permesis al ni, ke por inaŭguri ĝin, nia Ŝintoa Diservo de Oomoto estu plenumita en la plejsankta sino de la majesta Katedralo. Jam en tiu okazo, ni — la Usona Episkopa Eklezio kaj Oomoto — estis konvinkitaj ke ni faris gvidan paŝon al la celo de ĉiuj religioj — starigi la mondpacon per interreligia kompreno kaj kunlaboro. Ĉio tio okazis dank' al la mistera aranĝo de Dio kaj al la bonvola aranĝo de Dekano Morton, kiu provis ekzempli per alta kuraĝo la veron, ke Dio estas Unu. Ni uzas la okazon por denove danki lin pro ĉio, kion li tiam faris por ni.

Kaj por la hodiaŭa celebrado ĉe Oomoto, li speciale kunportis sian plej belan festmantelon el la Katedralo, kaj en ĝi li plenumis ĉi tie la liturgian servon ĝis bela fino. Nia respekto al li pro lia kuraĝo kaj sincereco, per kiu li plenumis la solenon, nur pliprofundigis. Ni dankas lin el la fundo de nia koro.

Ni tre ĝojas senti, ke nia hodiaŭa Celebrado donis al ni novan radion de espero por la estonteco de la homaro, ĉar ni firme kredas, ke per ĝi ni povis unu paŝon pliproksimiĝi al la starigo de mondopaco — pli proksimiĝi al la tago de la Dia venko, kiam la vero de "Dio estas Unu" estos akceptita kiel elpruvita tra la tuta mondo, kun ĉiaj homaj baroj de raso kaj kredo nuligitaj.

Mi profunde dankas al Dio pro Lia favoro senlime granda kaj vasta, kaj pro Liaj benoj tiel abundaj.



La enirejo
de
ĈŌJŌ-KAN
en
la Centro
de
OOMOTO
KAMEOKA

Azia Solidareco Fortikiĝas

— el la Oficiala Organo de ULBA —

ULBA estas la mallongigo de Universal Love and Brotherhood Association. Ĝi estas la anglalingva nomo, kiun *Jinrui Aizen-kai*, aŭ Universala Homama Asocio (UHA), ricevis postmilita. Ankaŭ en nia lingvo, “Asocio de Universala Amo kaj Frateco” (AUA) estus preferinda ol la ĝisnuna UHA.

— La Red.

NEPALO

Rev. Jasumi Hirose, Prezidanto de ULBA, Rev. Prof. Eiĵi Deguĉi, Konsilanto de ULBA kaj Direktoro de Doktrina kaj Rita Fako de Oomoto, kaj S-ro Masao Kobajaŝi, Direktoro de ULBA, alvenis ĉe Internacia Aerhaveno Gaucher, Katmanduo, je 12 pm, la 20an de marto 1977. Ili ricevis bonvenigon kaj girlandojn de S-ro N. B. Bajracharya, Prezidanto de la Nepala Filio de ULBA, kaj bukedon de S-ro V. A. Kanakdwip, Sekretario de la sama Filio. “Estas la Dia volo,” diris S-ro Bajracharya al la tri reprezentantoj, “ke ni estas ĉi tie kune en la lando de Himalajo kaj la naskiĝloko de la Sinjoro Budho, la torĉoportanto de paco”. Li gvidis ilin al la fama kaj antikva urbo Bhadgau, plena de valoraj memorigaĵoj, sur ilia vojo al lia loĝejo. En la vespero, kiam lokaj membroj de ULBA kolektiĝis tie, oni havis

mangokunvenon je ilia honoro.

La sekvantan tagon, la 21an, ili estis bonvenigataj de junulara grupo de la Nepala Filio de ULBA ĉe Ananda kuti Vidyapeeth, Swoyambhu, Katmanduo. Ĉe la pordego de tiu lernejo, administrata de S-ro Rajracharya, la japanaj vizitantoj denove ricevis girlandojn de la plej junaj studentoj. Kiam ili eniris la lernejon, ili ricevis la aplaŭdadon de 300 junuloj, kiuj varme akceptis ilin kaj enkondukis en la aŭditorion. Tie okazis bonvenigaj salutoj. S-ro Laxinarayan Sing, reprezentante la junularan grupon, diris: “Ni membroj de la junulara grupo de la Nepala Filio de ULBA ekstreme ĝojas pro la afabla vizito de la gvidantoj de la pacorganizato *Viswo Maitri Sangha* (ULBA) de Japanujo. Ni tutkore bonvenigas ilin kiel niajn patrojn de la sama familio de *Viswo Maitri Sangha*. *Jai Maitri Sangha* (Vivu ULBA)!” La dua parolanto, S-ro Jambling Lama, kiu venis de



Centro
de
Dia Amo
en
Katmanduo



Kunsido de Nepala Filio de ULBA en la Budha Ĝardeno

fora loko, proksima al Everesto, diris: “Ni faru voton en la ĉeesto de niaj gvidantoj — S-ro Hirose, Rev. Deguĉi kaj S-ro Kobajaŝi, en kiuj ni vidas la rektajn reprezentantojn de nia granda gvidanto Majstro Onisaburo, la Fondinto de ULBA, ke ni sekvos ilin por aktive partopreni en la pac-movado”. La lasta parolanto estis juna Budhista monaĥo, Rev. Sudarshan, kiu, menciante la Atombombojn faligitajn sur Hiroŝima kaj Nagasaki, admiris la bravecon de la japana popolo, kiu ekstaris por la pacafero post la mizera venkiĝo en Mondmilito II. Kaj li omaĝis al Fondintino Nao, ŝia filino Sumiko kaj Majstro Onisaburo, kiuj ĉiam predikis kaj praktikis pacon kaj estis veraj pacigantoj. La tri parolantoj profunde impresis la japanajn vizitantojn kaj ĉiujn aŭskultantojn.

La trian tagon en Nepalo, oni havis te-kunvenon en la Gita, Mandir, Hindua Templo sur Swoyambhu-altaĵo, kie la japanaj reprezentantoj intervidiĝis kun Swami Isworananda, la Aboto de la Templo kaj patrono de la Nepala Filio de ULBA. En sia bonveniga saluto, la Aboto diris: “En paco kaj en malpaco, en plezuro kaj en sufero, religio estis la ĉefsubtenilo por homo. Oni faris serĉadon tra diversaj pasejoj; oni faris raporton pri la serĉado kaj trovoj en diversaj lingvoj; oni adresadis la Ĉiopovan per diversaj nomoj; sed ĉiuj grandaj religioj alte tenadis similajn idealojn kaj valorojn, kvankam multaj homoj

estis perditaj tiel ofte en la fajroj de malamikeco kaj avareco, de malamo kaj egoismo. Grandaj religioj havas la komunan celon starigi pacon sur la tero. La Hinduismo de ĉi tiu antikva lando Nepalo observadis ĉi tiujn faktojn kaj en la Hindua Regno la toleremo kaj respekto al aliaj religioj ĉiam estis integra parto de nia vivo. Sekve, *Viswo Maitri* (Universala amo kaj frateco) estas esenca parto de nia religio, filozofio kaj kulturo. Por mi estas granda plezuro bonvenigi al nia Templo “Gita Mandir” tiajn personojn kiel vi, kiuj gvidas la movadon de *Viswo Maitri Sangha* en Japanujo”. Rev. Prof. Deguĉi en sia danko-saluto esprimis la similajn idealojn kaj valorojn de ilia kredaro, kaj la unuecon de ĉiuj religioj.

Dum la vespermanĝo ĉe S-ro Gyan Bahadur Mali, Direktoro de la Nepala Filio, la tri vizitantoj el Japanujo ĝuis la hejme-preparitan manĝaĵon, kiun oni prezentis, laŭ tipa maniero, sur teleroj kaj bovloj faritaj el folioj, kune kun argilaj taso manfaritaj — ĉio en tiel natura maniero, ke ĝi tuŝis la tre simpatiajn kordojn de la Oomotanaj gastoj.

Oni kunvenis por la IIIa datreveno de la fondo de la Nepala Filio, la 23an de marto 1977, sub la pinarboj en la Budha Ĝardeno (je 5ptm); prezidis en ĝi S-ro N. B. Bajracharya. La ĉefaj membroj de ULBA, kiuj partoprenis ĝin, estis, krom la tri japanaj reprezentantoj, Swami Isworananda, la Aboto de la Gita Mandir; S-ro Purna Bahadur Ma-

nab, membro de la Reĝa Konsilantaro; S-ro Tara Bir Sing kaj S-ro Pdma Bajra Lama, anoj de la Urba Asembleo de Katmanduo, ktp.

S-ro Kanakdwip, Ĉefdirektoro de la Nepala Filio de ULBA, faris raporton pri la pasinta jaro, i. a. ke en tiu jaro oni tradukis la "Outline of Oomoto" en la nepalan. Poste, la membroj akceptis la jenajn proponojn:

1) Konstrui domon de Oomoto-Sanktejo;

2) Traduki multajn verkojn el la Oomoto-literaturo en la nepalan;

3) Malfermi sub-filion de ULBA en Patan;

4) Peti al la Centro de ULBA kaj Oomoto stipendion por membroj de la Nepala Filio, por ke ili povu studi la japanan lingvon kaj la Instruon de Oomoto en Japanujo.

Poste, la tri japanaj reprezentantoj de ULBA faris paroladon, respektive, kaj klarigis la celadon de Oomoto kaj ULBA.

Sekvante ilin, Ĉefdirektoro Kanakdwip de la Nepala Filio diris: "Ni kolektiĝu sub la standardo de ULBA, kiu portas la penson kaj la filozofion de Budhismo kaj Majtreja Bodisatvo. Ĉar ni bezonas kunlaboron de la samcelanoj en tiu ĉi religia movado por Frateco kaj Mondpaco".

Reĝa Konsilanto S-ro Purna Bahadur Manab, kaj Budhista monaĥo Rev. Sudarshan laŭdis la aktivecojn de S-ro N. B. Bajracharya, ULBA kaj Oomoto. S-ro Manab diris, ke S-ro N. B. Bajracharya estas lia

multjara amiko, en kiu li trovas la ĝustan personon por fondi filion, kaj preni sur sin la respondecon en Nepalo de tia granda organizo kiel ULBA. La Nepala filio celas efektiviĝi la altan idealon de mondopaco per la aplikado de *Maitri Bhavana* — kreaĵ aktivecoj de universala amo kaj frateco — kiun komencis en Japanujo Majstro Onisaburo antaŭ ĉ. 50 jaroj.

Ferman saluton faris Prezidanto Bajracharya, ĝojplena pro tiu ĉi feliĉa okazo. Li analizis la nunan situacion de la mondo kaj asertis, ke "Religio inspiras nin transiĝi de malbono al bono, de mallumo al lumo, kaj sekvi vojon de vero anstataŭ malvero; ĝi levas nin el la marĉejo de mondumaj zorgoj; ĝi nobligas kaj sublimigas nian spiriton, kaj fine liberigas nin de ĉiuj katenoj. La aktuala rilateco de Oomoto al la moderna mondo kuŝas ĝuste en tiaj spiritaj priokupiĝoj. Ni, membroj de ULBA, kredas ke la granda supereco de Oomoto kuŝas en tio, ke ĝi ĉiam akceptis diversajn religiojn kiel diversajn pasejojn al unu kaj la sama celpunkto, kaj ke ĝi ĉiam montris toleremon, grandaninimecon kaj respekton al tiuj aliaj religioj; la praktika ekzemplo de ĉio ĉi estas evidenta en la ĉiutaga vivo de Oomoto. Ne mirinde, ke, kiel paralela ekzemplo, en la tuta historio de nia lando Nepalo ni spertis nenian krizon pro religia maltoleremo; reciproka toleremo kaj paca kunekzistado estas la bazo

de socia harmonio kaj kultura imagpovo en la tuta mondo ; — niaj antikvaj saĝuloj kaj profetoj, kiel la Sinjoro Budho kaj la Sinjoro Ŝivao, sidis, meditis kaj komprenis la bazan unuecon de la soifo de la homo por liberigi sin de suferado kaj de ĉio, en kio li implikiĝis pro sia propra nescieco.”.

Vespere, oni havis adiaŭan manĝokunvenon por la japanaj gastoj. Ĝin ĉeestis ankaŭ S-ro Surya Bahadur Shakyam, Vicprezidanto de la Tribhuban-Universitato, kaj S-ro Surya Bahadur Shashi, Sekretario de la Enlanda Ministerio. Laŭ la sonoj de Jakumo-kotoo oni dancis Tantristan dancon, kreante belan etoson de la kultura unueco de Japanujo kaj Nepalo.

En la mateno de la 24a de marto, ĉe Internacia Aerhaveno, oni prezentis al Prezidanto Jasumi Hirose ekzempleron de la nepala traduko de “Outline of Oomoto”. Kaj S-ino Keshary Rajracharya, kasistino de la Nepala Filio de ULBA, donis al la gastoj benojn laŭ la nepala maniero : *Sagun*, donaco de boligita ovo, girlando de floroj kaj ruĝa *Tika* sur la frunto, kiel marko de bona sorto kaj beno.

Hindujo


La ULBA-delegitaro alvenis ĉe la Madrasa Aerhaveno je 7 : 30ptm, la 24an de marto, kaj tie S-ro Seshadri, Prezidanto de la Madrasa Filio de ULBA kaj pli ol 10 aliaj kun

bukedoj bonvenigis ilin entuziasme.

La Movado de ULBA en Hindujo ĉiam pli progresis de post kiam Prezidanto Hirose kaj Direktoro Kobajaŝi vizitis nin en marto 1976, kaj montras fortan bezonon havi filiojn en aliaj urboj. Aliflanke, la membroj de la Madrasa Filio proponis instali dispensarion kaj fonduson de Dia Amo, kaj petis al la Centro de ULBA fari esploran rigardon surloke kaj havi konferencon kun ni. Jen la ĉefa celo de ilia vizito ĉi-foja.

La delegitaro restis ĝis la 29a kaj vidis la Urbon de Madraso, Hinduan templon, medicinan institucion establitan por bonfaraj celoj, lokon destinitan por nia Dispensario de Dia Amo kaj la malriĉajn kvartalojn kiuj ĉirkaŭas ĝin, lernejon (fonditan de la Prezidanto de la Madrasa Filio kaj lia edzino, Ges-roj Seshadri) ; ili vizitis la loĝejojn de kelkaj anoj de ULBA, la Muzeon, la Japanan Konsulejon, ktp. Ilin kondukis S-ro Karikar Vaitha, Direktoro de la Hinda Oficejo de ULBA.

La japana grupo ricevis intervjuon de raportistoj je 9 : 00 atm, la 27an de marto, ĉe la Hotelo Conemara, pri kio oni poste raportis en la *Hundu Mail*, k. a. Je 6 : 30 ptm, okazis Kongreso de la Madrasa Filio de ULBA ĉe la Hotelo Chola. Post la nacia ĝenerala elektado Hindujo devis renkonti diversajn sociajn ŝanĝiĝojn, kiel la malvenko de Ĉefministrino Gandhi, la naskiĝo de nova Kabineto, la prezaltiĝo sekvanta la forigon de la kriztempa



Dispensario
de
Dia Amo
konstruata



Ĉe la Kongreso de Madrasa Filio de ULBA, de maldekstre en la supra vico: D-ro Nanjunda Rao, Rev. E. Deguĉi, S-ro Seshadri, Prezidanto Hirose, S-ro Kobajaŝi, S-ro S. P. Ayangar, S-ro Vaitha, kaj 4 universitataj georatoroj kiuj gajnis premiojn, kun Prof. P. Varadaraju, dekstre.

leĝo, la striko de busveturigistoj kaj laboristoj. Kaj tamen, la Kongreso venkis ĉian malhelpon kaj sukcesis kun ĉ. 150 partoprenantoj. Inter la partoprenantaj membroj de la Madrasa Filio troviĝis multaj lokaj eminentuloj: universitataj profesoroj, advokatoj, kuracistoj, Hinduaj pastroj, lernejestroj kaj aliaj, kiuj okupiĝas pri edukaj kaj kulturaj aferoj, eks-ĉefjuĝisto de la ŝtata Alta Kortumo, ktp. Krome, la reprezentantoj de la Japana Konsulejo kaj de la gazetaro ĉeestis.

Prezidanto Seshadri de la Madrasa Filio de ULBA kaj D-ro N. Nanjunda Rao faris festparoladojn, kaj ilin sekvis la gratulaj salutoj de Prezidanto Hirose de ULBA, Konsilanto Deguĉi kaj Direktoro Kobajaŝi, kiuj esprimis sian dankon por la Movado de ULBA en Hindujo, kaj alvokis al ĉiuj plenan komprenon pri ĝia graveco en la hodiaŭa mondo, aparte pri la signifo de "Dispensario de Dia Amo". Tiu ĉi Dispensario estas malfermata en Julio, por akcepti tiujn, kiuj malhavas medicinajn servojn en la

malriĉaj kvartaloj de Madraso. Kvin kuracistoj faros sian servon sub la fama D-ro Nanjunda Rao, kiu estas unu el la membroj de ULBA. La ĉi-foja vizito far Prezidanto Hirose kaj aliaj elvokis al la membroj grandan entuziasmon: ili faros aktivan kampanjon por akiri helpon kaj subtenon de la aliaj koncernaj institucioj kaj kontribuojn de volontuloj.

Parenteze, en tiu ĉi Kongreso la Prezidanto laŭde honoris la laŭreaton de multaj oratoraj konkursoj universitataj. La aferon en tiu fako prizorgis Prof. P. Varadaraju de Madrasa Universitato, kiu fervore helpas S-ron Karikar Vaitha, Direktoro de la Hinda Oficejo de ULBA, por disvastigi la Movadon de Universala Amo kaj Frateco tra Hindujo, liverante la literaturaĵon pri ULBA al universitatoj kaj bibliotekoj en ĉiu ŝtato.

Direktoro de la Hinda Oficejo de ULBA, Vaitha planas inaŭguri novan filion en ĉefaj urboj, kiel Bangaloro, Bombajo, Kalikato, Delhio, k. a.

iam kompletigota plena verkaro de I. I. Zamenhof

5a kajero, 455p. tole bindita

hebreo el la geto ; de cionismo al hilelismo

kun koloraj ilustraĵoj de m. fruscieva

27 ned. gld. ĉe uea

Mondocivitanoj kongresis

en Kanazaŭa

“Por certigi la ekzistadon de la homaro”

Sekvante la Unuan Kongreson en Hiroŝima antaŭ du jaroj, la Dua Japana Kongreso de Mondocivitanoj havis lokon en Kanazaŭa la 23an kaj 24an de oktobro, 1976 kun partopreno de pli ol okcent japanoj kaj gastoj el Aziaj landoj kaj el Francujo, sub la aŭspicioj de la Tutjapana Unuiĝo de Mondofederalistoj, la Japana Religiista Ligo por Mondofederacio k. a. Por la organizado kunlaboris i. a. la Japana Parlamenta Komitato Mondofederacia, Ligo de Japanaj Mondanigitaj Komunumoj, Internacia Porpaca Asocio, Universala Homama Asocio.

Morale subtenis ĝin per siaj mezaĝoj la japana ĉefministro, la ministro de edukado, la ministro de eksterlandaj aferoj; kaj per siaj personaj salutoj la prezidanto de UNO-Universitato, la guberniestro, la urbestro kaj la prezidanto de Hiroŝima Universitato, k. a.

Bazan prelegon faris D-ro Unehara, prez. de Kiota Universitato de Artoj, sub la temo “La signifo de la

Orienta kulturo por la tergloba socio”. Sekvis tri apartaj laborkunsidoj, la 1a pri “Liberigo el la malsato”, la 2a pri “Kiel agi la mondocivitanoj?” kaj la 3a pri la temo, kiel efektiviĝi “Mondofederacion antaŭ la 21a jarcento”. En la 1a laborkunsido S-ro Ŭatanabe, direktoro de FAO-asocio, detale prezentis la historion kaj la aktualan staton de la produktado kaj distribuado de la nutraĵoj, kontraste al la kreskanta loĝantaro kaj konsumado. En la 2a laborkunsido, Prof. Kato, de Kantogakuin-Universitato, akcentis la gravecon levi nian celkonscion al la homara komunumo for de la koncepto de la naciaj komunumoj, nome ŝtatoj, kiu evoluis nur en la lastaj tri jarcentoj. En la tria laborkunsido, kiun S-ro E. Ito prezidis, S-ro Hirose, prez. de UHA, emfazis la neceson starigi la novan normon de valoroj, por pli forte antaŭenpuŝi la mondocivitanan movadon, kaj S-ro Koŝio — nian devon nepre komenci la fondon de mondofederacio jam antaŭ 1985.

Okazis viglaj diskutoj ne nur en la laborkunsidoj, sed ankaŭ en la ĝenerala sesio. S-ro Ĉon Iso, el Seulo, Koreujo, laŭvoĉe asertis ke la mondocivitanoj devas nepre lerni kaj uzi Esperanton. Urgan proponon faris S-ro Micuno, prez. de la organiza komitato, ke ĉiuj kongresanoj fastu morgaŭ matene kaj oferu la ŝparitan sumon por matenmanĝo al la malsatantoj en Aziaj kaj Afrikaj landoj. La kolektitan monon oni sendis al

Unisef. Ago modesta, sed pli bona ol nura parolo!

Post la kunsidoj la tuta kongresanaro faris longan procesion, portante grandajn manifestaciajn fraztabelojn: “Helpu la malsatantojn!”, “Ni estas civitanoj de la terglobo”, k. a. tra la viglaj stratoj de la urbo ĝis la centra parko, kie ili havis ferman solenon kun partopreno de multegaj urbanoj, kaj publikigis la deklaron kaj rezolucion aprobitajn dum la Kongreso.

La Dua Mondokongreso de Mondocivitanoj

“Por konstrui Mondokomunumon”

La 1a mondokongreso de mondocivitanoj okazis en San Francisco en 1975 kiel siatempe ni informis, kaj nun ni havas la ĝojon anonci pri la 2a kongreso okazonta en proksima somero. Ĝi havos du partojn. La 1a Parto okazos en la kongresdomo de Innsbruck, Aŭstrio, junio 25–29 kun la temo “kiajn novajn instituciojn oni devas krei”. La 2a Parto, kun la temo “kiaj malnovaj institucioj devas esti ŝanĝitaj” okazos en la urba Universitato de Parizo, julio 1–5. Por la laboro de 1’ kongreso kvar komisionoj estas preparataj: I por haltigi la

armad-konkuron, II por plenumi la bazajn homajn bezonojn kaj konservi la naturan medion, III por akceli la edukadon por mondokomunumo kaj mondocivitanecon, IV por evoluigi supernaciajn kaj terglobajn instituciojn.

Oni aranĝis ke la 1a Parto estu kunligita kun la Mondokonstitucia Asembleo okazonta samloke de 16 ĝis 29, junio kaj la 1a Parto estu ligita kun la 17a Ĝenerala Kunsido de W. A. W. F. (Monda Asocio de Mondofederalistoj) kiu okazos same en Parizo, ĉe Sorbonne, julio, 4–8

kun la ĉeftemo “Nova, ekonomia mondordo”. Por ĝi ok fakkunsidoj estas preparataj: 1. Ideologio kaj konsista karaktero de la aŭtoritato. 2. Armad-konkuro, 3. Loĝantoj kaj loĝejoj, 4. Internacia komerco kaj ekspluato, 5. Nutraĵo kaj malriĉo, 6. Ekologio kun medio, 7. Mondokomunumo kaj homaj rajtoj, 8. Regionaj organizoj, 9. Monda organizo. Tie en Sorbonne prelegos D-ro Anreljo Peccei, la fondinto de Roma Klubo, D-ro Sean MacBride, la fondinto de Internacia Amnestio, D-ro Alfred Kastler, nobelpremiito fizika, D-ro Robert Mallet, la prez. de Pariza Universitato ktp.

Oni antaŭvidas multnombrajn partoprenon el Japanujo. Oomoto kaj UHA organizos grupon el pli-malpli 25 delegitoj.

La respondeculo por la organizado de ambaŭ menciitaj kongresoj en Parizo estas s-ro Guy Marchand. Li partoprenis en la 2a Japana K. M. en Kanazaŭa kaj poste vizitis la Oomoto-

centron en Kameoka kune kun kelkaj eksterlandaj delegitoj el Hindujo, Nepalo, Hongkongo k. a. Li tre energie proponis, ke Oomoto kaj UHA, kiel pacmovado, starigu kandidaton por la 5a Transnacia Elektado (1977) por la Popola Kongreso. Oni decidis ke S-ro Eizo Ito, kandidatiĝu kune kun unu alia japano, nome D-ro Makoto Nagaoka, eksurbestro de Ajabe, la unua mondanigita urbo de Japanujo. La fina elekto okazos en Parizo komence de julio.

Ni scias, ke tiaj “privataj” asembleoj aŭ kongresoj ne kapablas rekte ŝanĝi aŭ krei ion konkretan oficiale. Ni scias tamen samtempe, ke ĉio konkreta kreiĝas el nevidebla mondo de ideo kaj ankaŭ ke kion la oficialaj ne kapablas, ĝuste tion povas fari la “privataj”, liberigitaj de kateno de oficialeco. Ni sincere deziras ke la kongresoj en Parizo metu brilajn mejloŝtonojn sur nia vojo al Paca Mondokomunumo kaj ke kiel eble plej multaj esperantistoj ilin partoprenu por sukcesigi la eventojn.

■ **Rimleteroj** de Marjorie Boulton kaj William Auld. Eld. Esperantaj Kajeroj, Manĉestro, Britio, 1976, 96p (147×102mm), broŝuro, ISBN 0 9505323 0 4 prezo: £ 1,05+10%, havebla ĉe BEA kaj UEA.

Kolekto de la rondeloj poŝtkarte interŝanĝitaj inter du elstaraj el niaj poetoj (anglino kaj skoto) dum 1953 — 1954. “Jen mia vico por demando. /Ĉu kredas vi je vivo ia/Post korpa mortotago nia?/Spite de pastra propagando, /...” (De B. al A.) — “Postmorta vivo? Ta! Ĥimero/de mens’ infana kaj naiva, /restaĵo de la primitiva/nescio, timo kaj — fiero. /...” (De A. al B.). /Kia interesa dialogo elvolviĝas en ĉi poemplibro de temo al temo! Eĉ prozemuloj povas plene ĝui la legadon per siaj oftaj intervenoj pensaj kaj meditaj ĝis atingi la finan eron.

LA GRANDA INVOKADO

*De l' Lumo-punkto en la Dia Menso
Lum' alfluu en mensojn de l' homoj.
Venu Lum' sur Teron.*

*De l' Amo-punkto en la Dia Koro
Am' alfluu en korojn de l' homoj.
Venu Krist' sur Teron.*

*De l' centro, konanta la Dian Volon,
Plan-cel' guidu voletojn de l' homoj ;
Plan-cel' de l' Majstroj kone servata.*

*De l' centro, nomata la homa raso,
Plan' de Amo kaj Lumo diskresku
Kaj sigelu la pardon al malbon'.*

Lumo, Amo kaj Povo refaru l' Ter-Planon.

La Granda Invokado — monda preĝo tradukita al jam pli ol 50 lingvoj — estis tradukita al Esperanto el la angla originalo, kiun ĝi respektas forme kaj ritme ; tradukoj al 5 aŭ 6 lingvoj estis plie atentataj.

Beleco kaj forto de l' Granda Invokado troviĝas en ties simpleco kaj en la esprimo de fundamentaj veroj, kiujn ĉiuj homoj normale kaj spontane akceptas : la vero, ke ekzistas supera Inteligento, al kiu ni svage donas la nomon Dio ; la vero, ke malantaŭ ĉiuj eksteraj ŝajnoj, la movo-povo de l' universo estas Amo ; la vero, ke granda individueco, nomata Kristo far la Kristanoj, venis sur Teron por enkarnigi tiun Amon sub komprenebla formo ; sed multaj religioj kredas je iu Instruanto de l' Mondo kaj nomas lin per tre diversaj nomoj, kiel ekzemple : Sinjoro Maitreja, Iman Mahdi, Mesio, . . .

La Granda Invokado apartenas al neniu grupo, al neniu aparta religio. Ĝi estas distribuata de l' bulteno "Trianguloj" en la celo servi la Homaron.

LA PREĜO DE L' NOVA TEMPAGŬ

La Granda Invokado estas monda preĝo, unika pro l' fakto, ke ĝi postulas nenion por la apartigita Memo. Ĝis nun, solaj, la avancintaj inicitoj kaj la disĉiploj uzadis tian invokadon, ĉar nur ili povis esprimi kaj

transporti tiun altan vibradon de pura seninteresiĝo. La fakto, ke la amasoj de l' homoj de l' Nova Tempaĝo uzados ĝin estas elokventa evidento, ke la Dia Plano por la homo estas survoje al sukceso kaj ke la homa regno evoluas. Tio eblas, ĉar "la koro de l' Homaro estas sana" kaj Dio en ĝi restadas. Tiu invokado, dum ĝi evoluigas nian konscion per ĉiutaga uzado, esprimas la destinon kaj la planon por la homo en la nova tempaĝo de l' Akvisto*). Ni ekzameni ĝin stanco post stanco.

De l' Lumo-punkto en la Dia Menso

Lum' alfluu en mensojn de l' homoj.

Venu Lum' sur Teron.

Inter la multaj kvalitoj de l' homa animo, lumo, amo kaj povo estas transcendaj. La Granda Invokado invokas la lumon por ĉiuj homoj en la tuta mondo, senkonsidere al ilia evolu-stadio, al ilia inteligenteco aŭ seninteligenteco, al ilia peka aŭ pura vivo, aŭ al kiaj ajn iliaj cirkonstancoj. Ne estas diselekto. Kristo fermas la pordon antaŭ neniu. Tiu Invokado ne povas esti efike uzata profite al individuo. La uzantoj profitas el ĝi nur se ĉiuj homoj profitas el ĝi. Sed ni memoru, ke la kunlaborantoj de Kristo pli rapide "evoluas", ol la nekunlaborantoj. La ŝlosil-tasko estas kunlabori, sed ne nure sekvi. Kristo uzas la Grandan Invokadon por urgigi la Dian Planon kaj por elvoki la spiritan povon por sia laboro, kaj kiam ni regule uzas ĝin, ni kunlaboras kun Li. En la Nova Tempaĝo, la pordo restadas larĝe aperta por ĉiuj, kiuj kunlaboras kun la Dia Plano kaj Kristo. "Kaj Dio diris: Lumo estu, kaj lumo estiĝis" kaj tiel la mondoj estis kreitaj kaj la povo de l' Vorto liberigita.

De l' Amo-punkto en la Dia Koro

Am' alfluu en korojn de l' homoj.

Venu Krist' sur Teron.

Amo estas tio plej granda en la mondo. La Mister-Skoloj de ĉiuj valoroj, kiujn oni hodiaŭ trovas en la moderna esoterismo de Okcidento. Kristo venis antaŭ dumil jaroj kaj donis al ni novan religion. Ĝi estis la religio de amo. Li instruis, ke Dio estas amo kaj komparis lin al amanta

*) *La Akvisto*: Signo de l' 11-a domo de l' Zodiako (21 jan/19feb), nomata en plej multaj lingvoj laŭ la latina Aquarius (= Akvisto, Akvoportisto), sed en la franca: Versisto. Ties simbolo prezentas viron, kiu verŝas la Akvon de l' Kono el amforo; pro tio la pli malnova latina nomo Amphora, kiu transiris al E-o (P. I. V.), verŝajne por eviti transskribon "akvario", ja alisignifa. La Tempaĝo, aŭ Erao de l' Akvisto debutis en 1962, jaro en kiu la unua homo surluniĝis! — Trad.

Patrō. Amanta patro ne sendas siajn infanojn al eterna punkorektado en inferon kreitan de l' homo. Tia loko ne ekzistas.

La Nova Tempaĝo, helpata de Kristo kaj de ĉiuj inter ni, kiuj tion volas, produktos novan religion. Certas, ke ĝi estos religio de amo. La amo ne povas esti elpuŝita. Unu fojon liberigita en la koro de l' homoj, ĝi neniam mortas. Tial ni invokas la amon en la Koro de Dio por sendi fluron en la korojn de l' homoj kaj multaj ankoraŭ estas la koroj fermitaj al la amo de Dio. La bezono de amo estas granda.

*De l' centro, konanta la Dian Volon,
Plan-cel' guidu voletojn de l' homoj ;
Plan-cel' de l' Majstroj kone servata.*

Ni rimarku, ke estas parolate pri l' Majstroj, ne pri l' Majstro. Tio estas grava, ĉar tio rilatas al la okulta Hierarkio de l' planedo. Tial estas al ni rekomendate konigi la ekziston de l' Hierarkio kaj tion fari ne aŭtoritatece sed per vortoj akceptindaj kaj saĝaj.

La Granda Invokado invokas la Dian Volon, kiu estas la manifestiĝo de lia Plancelo en lia tuta kreaĵo. Oni nun instruas al ni, ke la agnosko de l' spirita volo kaj ties konscia uzado far la homo estas la proksima granda paŝo antaŭen por la homa familio. Tio ja povus esti la plej alta nova noto en la religio de l' nova tempaĝo. Tiu spirita volo estas la cel-esprimo de l' amo mem. Lumo, amo kaj povo, kiel oni invokas ilin en tiu mantro aŭ preĝo de l' nova tempaĝo, estas en perfekta harmonio.

*De l' centro, nomata la homa raso,
Plan' de Amo kaj Lumo diskresku
Kaj sigelu la pordon al malbon'.*

La tuta povo de l' Granda Invokado estas koncentrita en la homa regno, parte por la profito de l' homo, sed ankaŭ por la profito de ĉiuj aliaj regnoj. Ĝi estas tiel povanta kaj ĝi tranĉas tiel profunde, ke ĝi povas fari tiun Teron sankta planedo kaj sekve konstrupova loko en la sunsistemo ; tio ĝi ja ne estas nune.

Destino de l' homo estas solvi la problemon de bono kaj malbono sur ĉi planedo. Kion ni nomas malbono, tio estas malbono nur pro l' perfortado de l' Dia leĝo. Kion ni nomas malbono estas ono de l' vivo de Dio kaj ne povas esti detruita. Tiu forto nun estas aktiva en la homa familio, ĉar ni lasas ĝin agi. Ĝi ne havas sian ĝustan lokon kaj devas esti transformita. Ĝi havas sian ĝustan lokon, kie ĝi havas konstruan funkcion. Niaj ideoj pri bono kaj malbono fakte estas misadaptitaj. Ni bezonas novan pens-

manieron. Tial per la Granda Invokado, ni laboras por la Plano de Dio fermante la pordon al malbono, eliminante ĝin el nia konscio.

La Dia plano estas plano de amo kaj lumo kaj tiu plano devas agi en la centro, kiun ni nomas la raso de l' homoj. Tion proklamas la Granda Invokado kaj sub la volo de Dio, ni devas labori por ĝia manifestiĝo. La sukceso de l' celo de Dio kuŝas en nia plenumiĝo. Ja nia plenumiĝo, ĉar ni ne estas spiritaj robotoj, senhelpaj fronte al destino, kiun ni ne povus kontroli.

Lumo, Amo kaj Povo refaru l' Ter-Planon.

La ŝlosil-vorto de ĉi stanco estas "refaru". Finfine, vere esti homo postulas mem-mastradon. Al ni estis donita la rajto elekti, kion ni deziras fari, eĉ se tio kondukis al rompiĝo kaj al malhelpo en la Plano de Dio, kaj ni rompis. Tial nia suferado estas ni-kaŭza, sed ne Dio-kaŭza, kaj nun ni estas konfrontitaj kun la rezultoj, kiuj akumuligis en la lasta kvarono de l' dudeka jarcento. Se ni daŭre agos erare, ni povos plimalbonigi ilin, sed se ni agos saĝe, ni povos neŭtraligi ampleksan parton de tiuj misefikoj.

Ĉiu el kiuj uzas la Grandan Invokadon helpas siajn kunulojn. Ĉiu el kiuj metas la Grandan Invokadon sub la atenton de aliaj kunlaboras kun la Planeda Hierarkio kaj kun Tiu, kiu staras ĉekape de l' Hierarkio, nome Kristo.

Tradukita el la bulteno "Trianguloj" n° 39 (marto 77), destinita al homoj de bona volo kaj publikita kvarfoje en jaro, en lingvoj angla, franca, germana, greka, hispana, itala, nederlanda, polona, portugala kaj skandinavaj. La "Trianguloj" esta aktivaĵo de monda servo por ĉiuj kiuj kredas pri l' povo de l' pensado.

Eblas informiĝi ĉe:

TRIANGLES:

1, rue Varembe
Case postale 31
1211 GENEVE 20
Svislando

866 United Nations Plaza
Suite 566-7
NEW YORK, N. Y.
Usono 10017

235, Finchley Road
Hampstead
LONDON, N. W. 3
Anglio

Redaktora Noto

La Tradukinto de ĉi tiu artikolo skribis al ni:

"Mi opiniis, ke ĉi supra mantr'o aŭ preĝo povos interesi la legantojn de Oomoto, kaj ankaŭ la ĉi-kuna artikolo, kies aŭtoron mi ne konas. La mantr'o estas de Inicito kiu igas nomi sin 'La Tibetano'. Sed kutime oni donas ĝin sen aŭtoronomo, same kiel la 'Patro Nia' de Kristanoj. Por la traduko, mi preferus resti anonima."

Respektante lian bonan volon, ni publikigas ĝin sen indiko de lia nomo.

DONACANTA MANO

(Pri la sinofera senco kaj ĝia efekto sur ni)

“... La vera esenco de la sinofero ne estas membuĉofero, sed sindono. Ĝia celo ne estas estingiĝo, sed plenumiĝo. Ĝia metodo ne estas sinturmento, sed pli granda vivo; ne kripliĝo, sed transformiĝo de niaj naturaj homaj partoj en diajn membrojn; ne sintorturo, sed transiro de malpli granda ĝojo al pli grandaj feliĉo kaj beateco”.

Sri Aŭrobindo

Tre klare, tre decide, Sri Aŭrobindo difinas la veran esencon de la sinofero kaj al ĝi donas sencon, kiun ni perdis preskaŭ totale, kiu ne koincidas kun nia nocio, kun nia interpretado de ĝi, kiu metas kiel fundamenton la ideon ke la homo, por kontentigi pli plene alian homon, ajon, kreiton aŭ Povon kaj Personon diajn, devas doni parton de si, elpreni aŭ kvazaŭ eltranĉi ion de sia ekzistado kaj esto, kaj tiel estas ĉiam la ombro, laodoro de ia memkripliĝo. Strange, io en ni serĉas tion ĉi, tion ĉi ŝatas, kaj inkluzive ŝatas elmontri ĉi tion — ju pli videbla iĝas tio, kion oni tiras el si, ju pli ni sukcesas elmontri, laŭ ia mezuro, vivi kiel reala, la memmalkreskon kaj la doloron, des pli granda ŝajnas la sinofero, kaj des pli ankaŭ ni spertas malluman, malvirtan kontenton, re-

sume; eĉ ŝajnas, ke, se ni ne sentas kvazaŭ ni estus torturataj, se ni ne vidas konkrete, ke ia redukto de niaj ekzistado kaj esto okazas, ni do ne donacis, do vere ni ne oferis ion ajn, la donado estis tro facila; ĝi bezonas dolori, aŭ almenaŭ ĝi devas havi la impreson, la ombran iluzion de la dorolo, de la malriĉiĝo, de la kripliĝo.

Sed Sri Aŭrobindo ne konsentas pri tio: la vera esenco de la sinofero ne estas estingiĝo, sed plenumiĝo, diras li. Do, ni devas ne tuŝi la mallumon, estas la vico de la lumo anstataŭ de la ombro: per sinofero, per memdonado, aŭ simpla donaco, la homo devas sukcesi eltrovi sian realan valoron (kaj ĉi tio signifas memmalkovron), eltrovi en si fortojn kaj eblecojn, kiuj, sen la donaconeceso, neniam estus trovataj kaj uzataj — ĉar rilate al ĉiu el ni, kiel izolita, soleca individuo, oni per si

mem normale kontentiĝas kun malmulto por ekzisti, kelkaj elementoj sufiĉas, kvankam ili eble estas distingigaj kaj altvaloraj. Tiel en soleca, malvasta vivado, multo en ni estas latenta, ne vekita, daŭras nekonata — semo kaj kaŝita potenco — eble io seka, pala, io tre malproksima de la realiĝo; kaj tamen, kiam, dum ia momento, ekzistas la neceso donaci — se ĉi tiu neceso ekaperigas en ni realan respondon — tuj semoj en ni ekvigliĝas, ekgajnas vivon kaj realon, ĝuste ĉar io malsama aŭ plibona, pli perfekta aŭ pli forta ol tio, kion ni nune posedas, aŭ kio ni estas, io ĉiuokaze vivanta kaj tiel spontana kaj nova, estas vokata por esti oferata. Pro tio Sri Aŭrobindo diras, ke la vera sinofero ne estas estingiĝo, sed plunumiĝo: estas veno al pli komplete realiĝo, estas veno al pli plena esto.

La reala signifo de la sinofero ne estas do turmentado, skurĝo, memnuligo, sed kreskanta vivo, pli granda vivo, ĉar per donacado ni ne vivas plu centrita (ŝlosita) en nia propra cirklo, sola, sed ĉi tiu malfermiĝas, ĉar io devas eliĝi el ĝi: mi donacas. Eĉ vidite tre ekstere kaj primitive, eĉ rilate al kvantafero, mia vivo pligrandiĝas se per la donaconeceso mi devas starigi konkretajn rilatojn kun aĵoj aŭ homoj, kiuj, ĝis nun, ne eniris en mian ekzistadon (aŭ nur kondiĉe),

kaj en tro pligranda grado ankoraŭ okazas la plivastigo de miaj esto kaj amplekso, rilate al interna vivado — kaj precipe estas tio, kio valoras — ĉar mi estas bezonanta, mi devas oferi, respondi, disradii, krei — al kreskanta intenso, kaj estas ja tia maniere, ke la propra vivo kreskas.

Sindoni al io pli alta, sin fordoni al la Vero, estas la totala sinofero: la sindono al Superego, al la Dieco. Ĉu tio signifas, ke la memdonacado al Dio devas okupi ankaŭ la lokon de la sindono al aliaj, al la aĵoj, al la mondo? Ĉu tio signifas, ke, fine, estas nur Li, antaŭ kiu ni ĉiam estas? Jes, estas ĉi tio, tre ekzakte. Sed ĉar Li estas ĉio, ĉar nenio ekzistas krom per Li kaj laŭ Lia Volo, la aliaj, la aĵoj kaj la mondo ne bezonas esti eksigitaj de mia donacado kaj amado, ĉar en ĉiuj ili estas la Dia Principo, Dio. Tiamaniere, ĉiufoje kiam iu el ni sindonas al homo, aĵo aŭ ago ktp. — se li realigas sian donacadon tutece, pure kaj neinterese — li sinoferas al Dio, kaj tiel firmiĝas, en tio, al kio li sin donacas, Lian Ĉeeston, kaj Lian Povon kaj Lian Grandon, obeante al impulso, venanta el liaj plej profunda interno, kie brulas la flamo de la aspirado (eĉ se la individuo ne estas konscia pri tiu origino, nek pri la kvalito, pri la signifo de ĝia movado) kaj per ĉi tio, per sia konsekrado al la esenco, vivigita,

t. e., en la vera sinofero, okazas io kiel transsubstanciĝo, neklarigebla movado, for de nia volo kaj atingo (almenaŭ komence) : “niaj homaj naturaj partoj” transformiĝos “en diajn membrojn”. Per tio, Sri Aŭrobindo volas diri, ke proporcie kiel ni akceptas, ke niaj naturo kaj esto fariĝas transdoniloj de alidimensiaj intencoj, de pli altaj intencoj devenintaj de planoj kaj realoj nuntempe ankoraŭ pli superaj al tio, kion ni surtere travivas, dum ĉi tiu horo de la mondo, tio, kio pasas tra ni, ne lasas nin samaj, sed — per pacienca kaj subtila laboro, eble nekaptebla por needukita, ankoraŭ kruda percepto — nin transformas substance.

Do, la fizika donacanta mano — kiam en ĝi la tuta esto simple kaj plene sin donas — ne restas nur la osta, karna mano ; en la donacomomento ĝi transformiĝas membro de pli granda korpo, sensore nesentebla, kaj tamen ĉeestanta, reala ; kaj ju pli konscienca iĝas la donacado, ju pli ĝi naskiĝas el la interno kaj estas instrumento de amo, nin trapasanta, des pli forta la transformiĝo ; la mano ne plu estas nur primitiva membro de ĉi tiu homa korpo, naskiĝinta de ia virino, korpo tiomaĝa, tiakolora, tiaseksa, portanta tiajn kapablojn kaj neperfektaĵojn kaj sukcesas esti membro, organo de ia ago de la Nevideblo, transdonilo de io vaste

grandvalora, io senfine pligranda ol la propra mano kaj korpo, al kiu ĝi apartenas. Kaj ju pli kreskas la konscio pri tio ĉi, kaj ju pli la homo volonte konsentas kaj sukcesas donaci por donaci (donaci por la donacoĝojo), des pli lia mano, lia rigardo, lia voĉo, aŭ lia tuta korpo, lia kompleta ekzistado, povas iĝi tujaj membroj de nevideblaj formadoj, iom post iom pli altaj, pli sublimaj, pli diaj. La mano destinita, ŝajne, ekskluzive manumi ilojn aŭ fosi la teron aŭ elpreni fruktojn aŭ fizike karesi aŭ bati, agi, labori, ne forlasos tiujn funkciojn, dum ankoraŭ neantaŭvidebla tempo, sed ĝi ne plu sin limigos je ĉi tio, primitive : kiam ĝi estas organo de totala donacado, la mano superas sian krudan, naturan sencon ; ĝi portas, transportas kaj fluigas alian povon, ian veron pli subliman kaj pli centran, ĝi — nun — estas instrumento de realoj, kiuj estas transe.

La manoj de ĉiu el ni, de ĉiuj ni, fariĝu tia instrumento ; ilia ĉesto kaj ago esprimu kaj ĉeestigu Lian Amon, Lian Volon kaj Povon ; la Sinjoro estu en ili kaj tra ili. Niaj manoj — mistero kaj graco — estu la organoj, estu realaj membroj de la Dia Korpo.

Elportugaligis :

Moseo Garcia Sobrinho

El la “Proverbaro”

En la *Proverbaro Esperanta* (dua eldono, 1925), verko aranĝita de d-ro L. L. Zamenhof, la jenaj proverboj enhavas la vortojn :

DIO — DION

Al Dio plaĉu, sed sur diablon ne kraĉu.

Al Dio servu, diablon rezervu.

Al porko Dio kornojn ne donas.

Ankoraŭ Dio ne dormas.

Bovidon mi atendis, infanon Dio sendis.

Ĉiu por si — por ĉiuj Di’.

Danĝero sieĝas, al Dio ni preĝas — danĝero ĉesas, ni Dion forgesas.

Dio al vi donis, por ke vi povu doni.

Dio batas, Dio kompatas.

Dio donis buŝon, Dio donos manĝon.

Dio donis, Dio prenis.

Dio donis infanon, Dio donos manĝon.

Dio donis kaj benis, sed diablo forprenis.

Dio donis oficon, Dio donas kapablon.

Dio donis oficon, Dio donas prudenton.

Dio donis tagon, Dio donos manĝon.

Dio ĝuste faras, neniam eraras.

Dio kompatu.

Dio longe paciencas, sed severe rekompencas.

Dio manĝon donacis, sed la dentoj agacas.

Dio ne perfidas, se homo lin fidas.

Dio ne ricevis, diablo forlevis.

Dion fidu, sed senfare ne sidu.

Dion kolerigis, homojn ridigis.

Dion laŭdu kaj diablon aplaŭdu.

Dio orfojn ne forgesas.

Dio punas laŭ la fortoj.

Dio puni deziras, li la saĝon fortiras.

Dio scias bone pri niaj bezonoj.

En plej alta mizero al Dio esperu.

Faras rabon kaj ŝtelon, por oferi al Dio kandelon.
 Faru vian aferon, Dio zorgos ceteron.
 Forte sidas, kiu Dion fidas.
 Gardu min Dio kontraŭ amikoj, kontraŭ malamikoj mi gardos min
 mem.
 Hom' malesperas, Dio aperas.
 Homo pafas, Dio trafas.
 Homo proponas, Dio disponas.
 Ju pli la infanoj bezonas, des pli Dio al vi donas.
 Kie estas harmonio, estas beno de Dio.
 Kion Dio ne donis, perforte ne postulu.
 Kion Dio ne donis, tion perforte ne serĉu.
 Kion ni vere bezonas, Dio ĝin donas.
 Kiu hontas nenion, ne timas Dion.
 Kiu sian langon katenas, Dio lin benas.
 Komenci per Dio kaj fini per diablo.
 Kontraŭ homo fera, Dio estas severa.
 Kontraŭ kalumnio ne povas batali eĉ Dio.
 Kontraŭ volo de Dio helpas nenio.
 Kun Dio vi iros ĉien, sen Dio nenien.
 Mizero plej ekstreme, Dio plej proksime.
 Ne atingos krio ĝis la trono de Dio.
 Nek pio por Dio, nek kapablo por diablo.
 Popolo diras, Dio diras.
 Por ŝafo tondita Dio venton moderigas.
 Preĝejo proksima, sed Dio malproksima.
 Respektu Dion kaj reĝon kaj obeu la leĝon.
 Se amas Dio, prosperas ĉio.
 Se Dio ne aranĝos, lupu vin ne manĝos.
 Se Dio ne volas, sanktulo ne helpas.
 Se Dio ordonos, eĉ ŝton' lakton donos.
 Servo al Dio vana ne restas.
 Singardeman Dio gardas.
 Tondro kampulon memorigas pri Dio.
 Trio plaĉas al Dio.
 Vivi ĉe la brusto de Dio.

ĈIELO — ĈIELON

Aliloka ĉielo estas sama ĉielo.
 El klara ĉielo tondro ekbatis.
 En nomo de l' ĉielo, sed pro bono de l' felo.

Kiu rigardas ĉielon, maltrafas sian celon.
Mortinta serĉu ĉielon, vivanto ian celon.
Ne gutas mielo el la ĉielo.
Okupi sen celo lokon sub ĉielo.
Pura ĉielo fulmon ne timas.
Se la ĉielo falus al tero, birdokaptado estus facila afero.

ĈIELA

Edzo kaj edzino — ĉiela difino.

ANIMO — ANIMON

Animo al paradizo deziras, sed pekoj retiras.
Forsavis sian korpon kaj animon.
Fremda animo estas abismo sen limo.
Klopodi sen limo per korpo kaj animo.
Ili vivas per unu animo en du korpoj.
Lia animo forkuris en la pinton de la piedo.

ANGĜELO — ANGĜELON

Inter fremdaj ŝi estas edzino-angĝelo, kun la edzo ŝi estas demono kruela.
Esti angĝelo inter homoj, sed satano en la domo.
Kalumniante konstante, oni eĉ angĝelon nigrigas.
Kontentigi ĉiujn eĉ angĝelo ne povas.
Traflugis angĝelo preter orelo.

ANGĜELA

Parolo angĝela, sed penso pri ŝtelo.

AMO

Amo estas forta, sed mono pli forta.
Amo faras ion, mono ĉion.
Amo kaj ĵaluzo estas gefratoj.
Amo kaj puno loĝas komune,
Amo pli kora, disiĝo pli dolora.
Amo supermezura ne estas plezura.
Edziĝo pro amo flamanta al la sako sonanta.
Kiam sako mizeras, amo malaperas.
Perforta amo estas plej forta malamo.
Pro amo al la kandelo kato lekas la kandelington.
Tuso kaj amo ne estas kaŝeblaj.

MALAMO

Perforta amo estas plej forta malamo.

AMAS

Dentoj mordas la langon, tamen ambaŭ sin amas.

Kiu amas ĝuon, amu ankaŭ enuon.

Kiu amas honoron, amu laboron.

Kiu amas la liton, ne akiros profiton.

Kiu amas okulaĉi, ne havas kion maĉi.

Mono amas kalkulon.

Se amas Dio, prosperas ĉio.

Se oni amas la gaston, oni zorgas la paston.

Vi amas preni, amu redoni.

EKAMAS

Kiun vesto ornamas, tiun homoj ekamas.

MALAMAS

Sanktfigurojn ornamas kaj homojn malamas.

AMANTO — GEAMANTOJ

Eĉ por pomo putranta troviĝas amanto.

Geamantoj sin pikas.

Malamanto de faro estas amanto de kalendaro.

MALAMANTO

Malamanto de faro estas amanto de kalendaro.

MALAMATO

Venis mizero, — helpu min, frato ; pasis mizero, — for, malamato.

AMANTA

Por paro amanta ĉiu loketo sufiĉas.

AMATA

En ĉeesto amata, en forest' insultata.

Ne bela estas amata, sed amata estas bela.

AME

Eĉ monstron admiras, kiu ame deliras.

Japanujo Planis Kreadon de Juda Ŝtato

Antaŭ kelkaj tagoj ni havis konversacion kun Rabeno Marvin Tokayer, kiu estis spirita gvidanto de la juda komunumo en Japanujo. Li loĝis en la kvartalo Ŝibuja-ku, Tokio.

Dek jarojn okupis Rabeno Tokayer tiun postenon kaj estis ligita ne nur al la juda vivo en Japanujo, sed ankaŭ al la ĝenerala kulturo de tiu lando kaj ĝia civilizacio. Iom post iom li akiris lertecon en la uzo de la japana lingvo kaj publikigis pli ol dek librojn, japanlingve, pri la Talmudo kaj aliaj faktoj de Judismo.

Antaŭ kelkaj monatoj li forlasis Japanujon kaj revenis Usonon, por akcepti ĉi tie postenon de rabeno. Ne estis facile al li forlasi Tokion, sed li opiniis, ke tie lia misio jam finiĝis. Li serĉas nun posteulon, kiu estus kapabla transpreni lian postenon kiel spirita gvidanto de la japana juda komunumo.

La plimulto de la judoj, kiu vivas

en Tokio, venis el Siberio, el Ĥarbino — kiu situas en Manĉurujo — kaj el aliaj regionoj. Ili nombras proksimume 800 personojn kaj koncentriĝas en Tokio, Kobe, kaj iuj pli malgrandaj urboj. Nagasaki estas ofte menciata kiel juda loko, sed judoj ne plu vivas tie. Restis nur juda tombejo en Sakamata Gajĝin Boĉi!

En Tokio vivas 130 judaj familioj. Ilia centro estas en Ŝibuja-ku, la supre menciita kvartalo, kun sinagogo ("Bet-David") kiel parto de la domo. Ĝis la lastaj monatoj estis D-ro Tokayer la ĉefrabeno. En tiu centro troviĝas ankaŭ koŝera lakteca restoracio. Ĉefo de la komunumo estas s-ro Walter Citrin. La israela ambasadejo havas lokon ne malproksime de la juda Centro, ĉe strato Niban-ĉo, en la kvartalo Ĉijoda-ku. Juda tombejo troviĝas en Jokohamo. Ĝi estas restaĵo de la iama juda komunumo en Japanujo.

AMU

Amu Antonon, sed gardu vian monon.

Amu domon novan kaj amikon malnovan.

Amu edzinon plej kore, sed tenu ŝin bonmore.

Ni amu nin frate, sed ni kalkulu akurate.

Vi amas preni, amu redoni.

Ni sidas en ortodoksa sinagogo de Ĉikago kune kun aro da rabenoj, ortodoksaj, konservativaj kaj reformaj. Senceremonie fluas la konversacio kun Rabeno Tokayer kiu estas konservativa rabeno, sed havas barbon kaj aspektas kiel junulo el la ĥasidisma medio. Ni parolas pri la juda vivo en Japanujo, kaj li malkaŝas antaŭ ni faktojn nekonatajn. Kelke da ili estas malpli gravaj, sed karakterizaj, kaj montiras kiel malmulte oni scias en tiuj foraj regionoj pri Judismo. Ekzemple, japana firmao petis de Rabeno Tokayer ateston pri koŝereco de populara japana ŝinko "Toito"... La japanoj havas malklaran koncepton pri Judismo kaj opinias, ke per tia atesto la ŝinko fariĝas koŝera. Oni petis ankaŭ koŝeran ateston pri la dentpasto "Colgate", por vendi ĝin al judaj konsumantoj.

Japanoj rilatas al la juda popolo kun respekto kaj elmontras grandan admiron. Vastan kontakton kun judoj ili ne havas, tamen rigardas la judojn kiel samgentanojn de Albert Einstein, Sigmund Freud kaj Karl Marx... Ili ne ŝatas Kristanisman kaj rigardas la krucon kiel simbolon de glavo, ĝuste tiel kiel Ĉinujo rigardas la okcidenton sia malamiko...

D-ro Tokayer mencias punkton rimarkindan. Oni ofte emfazas, ke la israela ŝtato estas fortikaĵo de demokratio en la Meza Oriento. Japanoj ne rigardas tion kiel signon de supereco. Ili pli ŝatus, ke ĝi estu integra parto de la Meza Oriento.

Israelo kiel parto de la Okcidento estas en iliaj okuloj malsupereco.

Ni ekscias detalojn pri la juda vivo en Japanujo. La diversaj branĉoj de Judismo, kiel tiuj en Usono — ortodoksa, konservativa kaj reforma — ne ekzistas en Japanujo. La judoj tie ne identigas sin kun ili kaj portas neniajn ideologiajn etiketojn. Ili estas judoj sen doktrinaj diferencoj. Pro tio povas funkcii ĉe ili rabeno de iu ajn skolo kaj esti akceptita de la tuta komunumo.

Rabeno Tokayer estas granda admiranto de la japanoj. Dum la dua mondmilito, la registaro de Ŝanhajo — tiam okupita de la japana reĝimo — varme akceptis la rabenojn kaj studentojn de la fama talmuda lernejo de Mir (Litovujo) kaj faris ĉion eblan por komfortigi ilian vivon en Ŝanhajo. Certe, ordinara japano nenion scias pri la aparta juda vivmaniero. Kiam ili vidis, ke la lernejestro, aŭ unu el la studentoj, surmetas preĝŝalon aŭ alligas filakteriojn, ili suspektis, ke tiuj viroj estas spionoj kaj tiamaniere ili transdonas signalojn al la malamikoj... Sed tuj oni povis pruvi la senkulpecon de la judoj kaj la bonaj rilatoj reestabliĝis.

Mallonge antaŭ la atako ĉe Pearl Harbor la japana registaro ellaboris planon por krei judan ŝtaton sur japana teritorio. Ĝi intencis starigi judan reĝlandon! Rabeno Tokayer posedas dokumenton kun pli ol 10.000 paĝoj, japanlingve, kiu enhavas detalan planon por krei judan ŝtaton en Japanujo.

La nokta entrudinto

Nokto. Kiam ĵus pasis televid-programero "La Ora Horo", la virino aŭdis sur la pordo de la apartamento frapojn kaj voĉon, kiu krias: Ha lo! Telegramo por vi. . .

Ŝi ekstaris grumblante:

— Kio? Telegramo en tia horo!

Ĉu io urĝa en la studio? Sed. . . ha jes, mi estis ekstere, oni do telegramis al mi kontaktu kun ĝi senprokraste ĉe mia reveno hejmen. Sendube tiel.

Ŝi loĝadis sola en tiu ĉambro. Ŝi havas okupon en studio, sed ne kiel aktorino. Multe da scenejfotoj ornamas la murojn de la ĉambro, sed neniu el ili portas ŝian portreton.

— Telegramo! Neniu en la ĉambro? — daŭris la voĉo de juna viro.

— Jes! Tuj.

Ŝlosilo sonoris en ŝia mano, kiu tiris la anson internen.

Viro preskaŭ enfluis.

— Senbezone eniri! Ha, vi ne estas telegramportisto?

Kaj ŝi fikse rigardis sur lin, kaj vidis, ke li ne portas la uniformon de telegramportisto; li estis junulo malpure vestita. Li parolas en voĉo anhela sed mallaŭta:

— Kiel ajn! Sed tuj fermu la

pordon!

Ŝi obeis, timigita per lia laŭta sed premanta voĉo.

Neniam ŝi spertis ion tian, kaj ŝi ne povis ne demandi lin:

— Kio en la mondo, ke vi per mensogo devigas min malfermi la pordon? . . .

— Vi laboras en kinokompanio? Mi rememoris tion dum mi iris preter ĉi tie. Jen kial mi vin vizitis.

— Jes?

— Nun mi petas vin pri unu afero.

— Vi misvizitis! Vi tute vane min vizitis, se vi volas esti stelulo. Certe mi laboras en kinokompanio, sed mi estas nek aktorino nek direktorino; nek gvatistino nek planistino. Tial mi absolute maltaŭgas por tiacele vin akcepti. Prefere vizitu alian, kaj forlasu min.

Ŝi leĝere voĉridis. Fakte la junulo estis ĝentila kaj havis mienon elegantan. Li povus aperi en la filmo, se li trairus decan formalajon. Viro kun mieno pli malnobla ol li havas lastatempe sufiĉan influon sur la ekrano. Tamen li min vizitis por nenio alia ol melki kaprovion.

Kaj kun tia penso ŝi etendis la manon malfermonde al li la pardonon. Sed li kaptis ŝian manon. Mirinde preforata estis lia mano, spite lian delikatan konstitucion.

— Mi scias tion. Mi venis ĉi tien ne por fariĝi stelulo.

— Kion vi do volas ?

— Mi volas de vi ricevi ion.

La junulo elprenis el la poŝo ian ponardon, kaj repuŝis ĝin. Vidante la timigan konduton, ŝi juĝis pli prudenta ne kontraŭstari lin.

— Ne agu sovaĝe. Mi donos al vi kion vi deziras.

— Nenion mi faros, se vi restos kvieta.

— Sed kion vi volas, ke mi faru por vi ? Mi havas ĉe mi nenion altvaloran : nek monon nek juvelon. Ĉiu laboranto en kinokompanio ĝuas luksan vivon kiel la unuaklasa stelulino.

— Tion mi scias. Eĉ mi havas tiom da komuna saĝo. Kion mi deziras de vi estas nenio konkreta, sed nur io simpatia.

— Kion mi do faru por vi ?

— Sufiĉas, se vi praktikos por mi la teknikon de viaj fingroj. La fingroj ja ne elfrotiĝus per unufoja praktikado. Obeu min, alie ili efektive elfrotiĝus ! — kaj li reenmetis la manon en la poŝon.

— Konsentite. Ne faru ion maldecan, sed kion mi faru, kaj por kiu ?

Ŝi decidis en la koro, ke ŝi agos laŭ liaj vortoj. Ŝi estas ŝminkistino de la kinokompanio, havanta altan talenton en sia kampo. Ĉiuj fotoj starantaj sur la muroj estas ŝiaj artverkoj. Tiu fruoldulo estas deformita de ŝiaj fingroj el aktoro de dudekelkaj jaroj, kaj la ĉarma junulineto sidigita apud li estas, en efektiveco, pli-ol-kvardekjara aktorino, kiun ŝia mano ŝminkis multege plijuna. Ankaŭ pendis foto de aktoro, kiu ĉiel aspektas kiel vera virino.

Ĉe ŝi la fingroj estas kvazaŭ magiista bastono. Ŝi ne povus plu vivi, se tiel karaj fingroj estus kurtigitaj.

— Mi estas en fuĝado. Unufoje fuĝinta, mi ne plu povos survoje ĉesigi la fuĝadon.

— Vi do dezirus, ke mi ŝanĝu al vi la mienon ?

— Jes. Duonjaron mi estis en la katenejo kiel juĝoto. Loko ne tro komforta. Hodiaŭ mi eskapis profitante la malatenton de la gardisto, dum mi estis transportata al la korto. Mi ne dezirus esti refoje en tia loko.

— Tiel ? Nenio do helpas, ke mi malakceptu vian deziron. Nu, eksidu tie ; mi faros. Sed mi timas havi la rezulton neperfekta, ĉar mankas ĉi tie la necesaj materialoj kaj iloj.

Ŝi sidigis la junulon antaŭ la trifaca spegulo, elprenis ilojn okaze trovitajn tie, kaj iom plifortigis la

iluminadon.

— Rapidu!

— Sed ĉu ne meritas rekonsideron? Ŝminkado ne estas ortopedio. Ĝi ne tenas sin longe. Baldaŭ ĝi defalos.

— Mi scias tion. Sufiĉas, se ĝi daŭros unu nokton. Sufiĉas, se mi povos trairi la gardreton.

— Kaj kian mienon vi deziras? Ĉu mi prefere ŝminku vin virina?

Kvankam en tia situacio, ŝia profesia intereso tamen eklevis la kapon. Se tiel ŝanĝita tiuparte kaj tiel ĉi aliparte, lia vizaĝo estos tre bone rigardebla kiel tiu de vera virino. Sed li rifuzas:

— Ne! Por tio mi devos ankaŭ ŝanĝi la kostumon. Tempo mankas por tio, kaj mi timas, ke oni tiom pli suspektos min en virina kostumo. Sufiĉas, ke vi aranĝu kiel eble plej radikale ŝanĝi mian mienon.

— Ĉu ne konvenus do minacema mieno de mezaĝulo?

— Probable jes. Bela temo konversacia, ke minacmienulo dankus al sia minacema mieno senĝenan fuĝadon!

— Nu, fermu viajn okulojn. Mi ŝminkos vin per kremo.

La junulo fermis la okulojn:

— Mi vin anticipe avertas neniel fari ion eksterpromesan. Mi ja estas kaptito pro rabado.

— Efektive la ŝajno trompas, ke

tia homo kiel vi estas rabisto!

Ŝia laboro progresis tra la nokta kvieto.

— Kiel plaĉas al vi tia aranĝo?...

La junulo rigardis sin en la spegulo.

— Prave oni laŭdas vin spertamana! Kiel abomena mieno! Mi tuta preskaŭ tremas ĝin vidante! Fakte majstra verko! Mi mem tute ne povas rekoni min en ĝi. Tiom malpli la aliaj sukcesus diveni!

En la spegulo sidis viro, brune sunumita kun minaca rigardo.

— Nu rapidu eksteren!

— Bone. Mi forlasos. Sed mi havas laboron antaŭ ol forlasi.

Li premtordis al ŝi la brakon, kaj per ŝnuro de la elektra starlampo ligis al ŝi la brakojn kaj krurojn.

— Kion vi faras?! Jen eksterpromese!

Vi mem agas eksterpromese. Mi sentis, ke vi faris sur mia dorso ion suspektan, kaj vi efektive ĝin faris!

Kaj li spegulis en la trifacan spegulon sian dorson, kie estas skribite per blanka farbo: Kaptu tiun ĉi viron! Tion ŝi skribis tiel zorge per sia fingro, ke li neniom eksciui!...

Ŝi ne neas tion sia verko, sed antaŭ brutala mieno de la junulo, timo trakuris ŝian korpon.

— Kion vi do faros kun mi?

— Mi ne estas tiel stulta, ke mi pro ofendo, aŭ vin murdos aŭ vin

vundos nur por pligravigi mian kulpon. Sufiĉas, ke vi restu senmova, sen kontakti al la polico. Dume mi fuĝos for.

La junlo surprenis viŝtukon okaze trovitan tie kaj kovris ŝin sur la buŝo. Ŝi ne plu povis voĉi.

— La pordon mi lasas neŝlosita. Morgaŭ matene oni certe venos, kaj savos vin. Ĉia aranĝo estos mustardo post la manĝo, se oni post tio dissendos mian portreton. Adiaŭ!

Kaj li, nun kiel alia homo, eliris tra la pordo.

— Vere dank' al via kunlaboro, ke ni lin kaptis! Kiel ĝene vi pasigis la horojn, mi timas! — diris la policano, kiu baldaŭ eniris la ĉambron, kaj ellevinte ŝin kuŝantan sur la planko, malligis al ŝi la ŝnuron.

— Ankaŭ mi deziradis, ke la afero glate iru. Kredeble li mem

estis en granda miro, kiam li estis kaptita.

— Ankaŭ ni same. Ni lin kaptis kredante, ke li estas la murdokrimulo, kies portreto estis vaste dissemita, sed kaptita estas la junulo.

Nome ŝi surmetis sur la junula vizaĝo la mienon de la sangavida krimulo, kies portreto estis pendigita en la angulo de la stratoj. Ankaŭ la junulo preferis esti kaptita kiel simpla fuĝinto, ol kiel la murdinto, kaj li ĉion konfesis.

— Ni tamen ne sciis, ke la civitanoj rigardis tiel entuziasme la portreton por kunlabori en la serĉado. Tio ĉi multege kuraĝigas nin, — diris la policano en ĝoja mieno.

Sed ŝi skuis la kapon :

— Eble mi estus la sola entuziasma rigardinto. Sciu, ke ĉia mieno estas valora specimeno por mia laboro.

Mankanta respekto

“Inter la dek ses reguloj de nia Fundamento troviĝas §9 fiksanta, ke ĉiu sono havas sian literon, ke esperantisto parolas la lingvon laŭ ĝia skribiĝo kaj skribas ĝin laŭ la fiksitaj sonoj. Tial eĉ nia Majstro, obeema al la de li mem donita Fundamento de Esperanto (FdE), ŝanĝis eĉ la nomon de sia familio,

veninta el la urbo Stuttgart en Germanujo, de l' origina Samenhof en la esperantistan Zamenhof. La Majstro faris sin tiumaniere sen-nacia, videble esperantista! Ĉi tio estas por mi nepre respektenda ordono de genia kaj pri sia valoro konscia pioniro, esperanta, ke la adeptoj sendube imitos lian ekzem-

plon senescepte.

Sed kio vere okazas? Kial tro multaj el ili ne volas lin sekvi? La obeado al la Majstra ekzemplo senreste destinis, ĝis kiam daŭris la periodo de Esperanto, kiun nomi "primitiva" certaj esperantistoj aŭdacas. Opiniante sin pli peniaj ol estis Zamenhof, tute sendependaj, ili ne malŝatas eĉ rompi la FdE, laŭ la volo de Zamenhof kaj liaj unuaj akcelantoj neniam ŝanĝenda, kaj preferas skribi — *ne paroli!* — Jesuo, Jerusalemo, jesuito, Israelo,

Josefo!!!

Kiel esperantisto, vere laboranta por la triumfo de Esperanto ekde 1909, mi kolere protestas kontraŭ ĉi tiu fikonduto de novuloj, kiuj ŝajne tute forgesis — se iam ajn kompreninte — la ĉefan rolon de Esperanto, laŭ la Dia providenco kreita de sanktuleca homo por la alvenigo kaj konservado de la promesita paco homara, ne kiel ludilo de homoj kun sufiĉa libertempo por ĝuiga ludado”.

D-ro Adolf Halbedl (Aŭstujo)

Paco al la spirito de Paŭlo Balkányi

multjara kunlaboranto en "Oomoto"

Paŭlo Balkányi forpasis fine de Februaro, kaj la lasta adiaŭo al li okazis la 17-an de Marto en Tombejo de Farkasrét en Budapeŝto, kien granda amaso da funebrantoj akompanis lian restaĵon. La funebra ceremonio estis celebrita laŭ kalvinana tradicio.

Pastoro Károly *Dobos* en sia funebra parolo menciis la tri familiojn, al kiuj apartenis la mortinto: la laŭsangan parencaron, la familion de kalvinana eklezio, kaj tiun de esperantistoj. "Lia kredo kaj homamo donis al li ambiciojn kaj forton por plenumi ĉiujn siajn taskojn ĝis la lastaj minutoj de la riĉa homa vivo."

Post esperantlingva ĥorkanto en la nomo de Hungara Esperanto-Asocio Ervin *Fenyvesi* adiaŭis la amatan "Onklon Paŭlo", kaj kortuŝe resumis liajn agadon kaj meritojn, per emfazo de liaj gravaj individuaj ecoj, t. e. la modesta sinteno kaj persista laboro. En la finaj frazoj de sia parolo li substrekis la taskon de la restintaj, funebrantaj esperantistoj: daŭrigi la persistan laboron de Paŭlo Balkányi, porti plu la flamon, la torĉon, kiun nun defaligis lia mano. "Lia laborplena vivo restos por ni eterne modelo, instigilo kaj kuraĝigilo" — finiĝis la funebra parolo.

La familio de Esperantistoj perdis antaŭ jardeko sian Paĉjon Baghy, en la lastaj jaroj Szathmári, Bárczi, Kalocsay, kaj nun nia Onklo forlasis nin. Ni devas gardi kaj flegi ilian memoron.

Márton Fejes

Leteroj de Prof. Waringhien kaj Prof. D-ro Lapenna al la Aŭtoro de la “Negativaj Komparoj”

aperinta en la lasta n-ro, pp. 109-116

Tre estimata Kolego,

mi legis kun granda intereso vian artikolon en Oomoto Jul.-Dec. pri la Negativaj Komparoj, kaj gratulas vin pro via grava atentigo kaj korektado de unu el miaj, certe multnombraj, eraroj. Vi tute pravas, asertante, ke tiaj negativaj komparoj ne devus ekzisti en E-o, kaj mi provos eviti ilin de nun.

Tamen, mi dezirus iom klarigi kelkajn punktojn de tiu afero.

1° La signifo ne estas absolute egala al samgrada komparo, ĝi diferencas per ia bezono pli akcenti la neverŝajnecon de unu el la du termoj. “Li ne estas pli markizo, ol mi papo” intencas jenan nuancon: mi, efektive, ne estas papo, sed estas *ankoraŭ* pli malvere aserti, ke li estas markizo. Same “tiu hipotezo, ne pli malverŝajna ol tiu de Paskalo” = “*almenaŭ* tiel verŝajna, kiel la Paskalo”. Jen la kaŭzo de tiu uzo de neegaleca komparacio, por esprimi iom pli, ol la simpla egaleca.

2° Vi eraris pri la signifo de la frazo 3 (p. 176): efektive Saul-Paŭlo nenie *rakontis* sian vizion, li nur aludis ĝin: li donis neniajn detalojn pri ĝi, kaj tiuj, kiujn oni ordinare prezentas, estis liveritaj de la “Agoj”, ne de Saul mem: do “same kiel Saul-Paŭlo ne rakontis sian vizion, ankaŭ Kefas-Petrotion ne faris”.

3° Estas tamen unu punkto, kiun vi preteratentis: en tiaj frazoj, la kutima senco de “ne pli ol” ne taŭgas kaj tion montras la fakto, ke post tiu “pli” troviĝas substantivo aŭ verbo, kiu ne toleras la ideon de komparacio: ekz-e en la frazo 1a: letero ne povas esti pli aŭ malpli respondita, ĝi estas respondita aŭ ne; frazo 5: oni ne povas pli aŭ malpli “atribui” ion al si, oni atribuas ĝin aŭ ne; frazo 8a, same (io ne estas pli aŭ malpli “lingvo”, ĝi estas tia, aŭ ne). Tiu rimarko pravas, ke en tiaj frazoj la komparilo “pli” ne povas aplikigi al la sekvanta vorto, sed al io ne esprimita, kvazaŭ: “estas ne pli vere aserti A, ol aserti B” (ambaŭ estas malverajoj, sed oni akcentas, ke, se la malvereco de B estas rekonita de ĉiuj, la malvereco de A devas esti *ankoraŭ pli klare* rekonata). Se esprimi iel alie, en la frazo 1a, oni povus diri “ĉar la unua ne estis respondita, *a fortiori*, des pli evidente la dua ne ricevis respondon”.

Tiuj ĉi rimarkoj estas nur por iom klarigi la originon de tiu ŝajne paradoksa uzado; sed mi kompreneble aprobas vian kondamnon de tia dirmaniero, kaj intencas enkonduki tiucelan rimarkigon en la reeldono de la PAG (“Plena Analiza Gramatiko” nova nomo de la PG, paralela al la PIV).

Kun miaj dankoj kaj simpatiaj sentoj,

via,

G. Waringhien

×

×

×

Estimata kaj kara kolego Nakamura,

Tre atente kaj kun granda intereso mi legis vian artikolon “Negativaj Komparoj” en *Oomoto* de julio/decembro 1976. Verŝajne kaj Prof. Waringhien kaj D-ro Albault skribos pli detale pri la afero. Mi mem deziras atentigi nur pri 2-3 punktoj.

Via dua moto — “Por ke lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas ĝin eŭropigi. . . .” — ŝajnas al mi kaj erara kaj sufiĉe danĝera por la afero mem de la Internacia Lingvo. Okazis en la lasta tempo ne nur ekster la Esperanto-Movado, sed ankaŭ interne de ĝi, ke oni atribuis al Esperanto karakteron de “eŭropa” lingvo. Mi mem ĉiam kontraŭstaris tiun grave eraran koncepton, science neniel pravigeblan, kaj klarigadis skribe kaj parole la *monde* internacian karakteron de Esperanto el ĉiuj vidpunktoj: interna strukturo (kombinaĵo de internaciigintaj radikoj, fonetika ortografio, esence aglutina gramatika strukturo), internacieco de ĝia socia portanto, internacieco de la celo. Vidu pri tio, ekzemple, en *Retoriko* (tria eldono, p-oj 102-104); aŭ en *Esperanto en Perspektivo*, p-oj 35-45; aŭ en *Elektitaj Paroladoj*, p-oj 43-47 (“Internacieco de Esperanto”) kaj p-oj 48-54 (“Ne Eŭrope, sed Monde Internacia. . .”). Nomi nian lingvon “eŭropa” estas ne nur objektive malĝusta, sed ankaŭ malutila por la disvastigo de Esperanto ĉie en la mondo, inkluzive Eŭropon.

Plue, oni inklinas identigi la francan, aŭ la anglan, aŭ ambaŭ kun “eŭropaj lingvoj”, kvazaŭ en Eŭropo ne ekzistus aliaj lingvoj, eĉ lingvoj apartenantaj al tute malsamaj lingvo-familioj. Kompreneble, ni ĉiuj devas evitadi “falsajn amikojn”, daŭre strebadi al maksimuma internacieco de Esperanto, gardadi kaj plu firmigadi ĝian unuecon. Tio estas unu afero. Tute alia afero estas ĝeneraligi personan eraron, ripete faratan sub la influo de la propra nacia lingvo (se entute temas pri eraro), kaj aserti, ke tial oni francigas, rusigas, kroatigas, japanigas ktp. la Internacian Lingvon. Eĉ pli malĝuste estas diri, ke pro tiaspeca eraro fare de iu Franco oni “eŭropigas”, aŭ fare de iu Japano oni “aziigas” Esperanton. Prefere

oni atentigu pri la eraro sen kia ajn ĝeneraligo, ĉar tiaj ĝeneraligoj ne respondas al la realo. Feliĉe. Aliflanke — kaj malfeliĉe — en la nuntempa realo manifestiĝis aliaj danĝeroj, serioze minacantaj eĉ la lingvon mem (falado de la lingvonivelo, planlingvismo, obskura “interlingvistikismo”, k. s.), pri kio baldaŭ aperos dokumentita artikolo en *Horizonto*.

Tiom principe. Sed kio pri la enhavo de via studaĵo?

Laŭ mi, via kompreno de *ne pli* (aŭ *malpli*) *ol* estas ĝusta, sed via interpretado de kelkaj ekzemploj prenitaj el *Ni kaj Ĝi* de Waringhien, ne ŝajnas al mi korekta. Sur p. 109 vi prave skribis, ke “por negativaj komparoj ĉiu lingvo iafaĵe uzas ironian esprimon el pozitivaj asertoj”. Tial la Zamenhofa “Li komprenas predikon kiel bovo muzikon” estas esprimebla per anstataŭigo de *kiel* per *ne pli ol*, do: “Li komprenas predikon ne pli ol bovo muzikon (komprenas)”. Sur p. 115 vi bone klarigas ke la uzo de *ne pli ol* en tiaj komparoj estas korekta — eĉ necesa, mi aldonas — ankaŭ en Esperanto, se per ili oni volas esprimi “ironion aŭ metaforon ekstravagancan, kiu subkomprenigas al ni per si mem ion maleblan”. Korekte: “naĝi kiel ŝtono,” “kompreni muzikon kiel bovo”, k. s.; do: “Li naĝas ne pli ol ŝtono”, aŭ “li komprenas muzikon ne pli ol bovo”. Kial? Ĉar estas ĝenerale konate, sen kia ajn kunteksto, ke bovo ne komprenas muzikon kaj ŝtono ne naĝas.

Tamen, ni ne forgesu, ke lingvo estas instrumento de komunikado, kaj ke komunikado okazas en difinitaj sociaj situacioj kaj kunteksto, kiuj difinas ĝian veran sencon. Ni prenu vian ekzemplon: “Ŝi estas ne pli bela ol ŝia patrino” (p. 110). Per si mem, kiel vi prave analizas, en Esperanto tiu frazo signifas, ke ili ambaŭ estas pli-malpli *belaj*, sed ke ŝia beleco *ne estas supera* al tiu de ŝia patrino. Tamen, se la patrino estas malbela kaj se la komunikanto kaj la persono, al kiu estas direktita la komunikaĵo, scias tion, do en tia *konkreta situacio* la sama komunikaĵo estas ironia kaj la vorto “bela” fakte signifas malbela, do: ambaŭ estas malbelaj kaj la filino estas same malbela kiel la patrino, aŭ eĉ pli multe ol ŝi.

Nun ni apliku la samon al 1-2 el la frazoj en la libro de Waringhien (W), kiujn vi rigardas eraraj.

W. skribis: “La dua letero ne estis pli respondita, ol la unua”. Vi analizas: “La dua letero ne estis pli respondita ol la unua *estis respondita*”. Absolute ĝuste, se oni analizas la frazon abstrakte, senkonsidere al la kunteksto. Fakte, W. prezentis la kazon sur p-oj 36 kaj 37 kaj, sekve, ĉiu leganto scias, ke monakinoj pere de mortinta “fratino” adresis oficialan petleteron al Jesuo, metis ĝin en la sepultaĵon kune kun la kadavro kaj atendis respondon. Ĉar tiu respondo, kompreneble, ne venis, la monakinoj malfermis la sepultejon kaj ŝargiĝis la kadavron per nova letero. Nur nun

W. ironie skribas, ke tiu dua letero “ne estis pli respondita ol la unua”: Por la legantoj de la libro — kaj nur pri ili temas, ĉar nur al ili estas direktita la komunikaĵo — atendi respondon je tiaj leteroj estas “per si mem io neebla”, *ne malpli ol* la naĝado de ŝtono aŭ komprenado de muziko fare de bovo. Tial, laŭ miaj kompreno de Esperanto kaj lingvosento — kaj mi ne estas Franco aŭ Anglo — la ironio de W. estas konforma al la spirito de la lingvo kaj perfekte komprenebla.

La samon oni povas diri pri la frazo “En tia hipotezo, ne pli malverŝajna ol tiu de Paskalo, ni nenion riskus. . . .” (p. 219 de la libro de W.). Vi interpretas jene: “ne pli malverŝajna = malpli malverŝajna = pli verŝajna” kaj asertas, ke la komparo de W. fine reduktiĝas al: “En tia hipotezo, malpli malverŝajna ol tiu de Paskalo (estas malverŝajna) = *pli verŝajna* ol tiu de Paskalo”. Ankaŭ en tiu ĉi kazo la legantoj scias, ke W. rigardas la hipotezon de Paskalo “malverŝajna”, eĉ absurda, ĉar tio klare sekvas el la komentoj sur p-oj 217-220. Do, ne povas esti dubo, ke la dua hipotezo estas aŭ same *malverŝajna* kiel tiu de Paskalo, aŭ eĉ malpli malverŝajna.

Laŭ mia opinio, viaj egaligoj estas malĝustaj, kio kondukas vin al erara konkludo. *Ne pli malverŝajna* ne egalas al *malpli malverŝajna*, ĉar *ne pli* malverŝajna povas ankaŭ signifi *same malverŝajna*. En juro *ne pli granda damaĝo* ol estas la valoro de savita havaĵo nepre signifas, ke la damaĝo povas esti ne nur malpli granda ol la savita valoro, sed ankaŭ egala al ĝi.

Eĉ pli malĝustas la egaligo de *malpli malverŝajna* kun *pli verŝajna*. *Malalta* viro certe ne fariĝas *alta* pro la fakto, ke li estas *malpli malalta* ol alia viro; *malpli trista* certe ne estas *pli gaja*, ĉar *malpli trista* ja estas trista, nur *malpli* (ol hieraŭ), dum *pli gaja* estas gaja, eĉ *pli gaja* (ol hieraŭ). Alia afero estas, ke en klaraj kunteksto aŭ en konkretaj situacioj de interkomunikado oni povas rilatigi la *pli* kun pozitivo al la inverso de tiu pozitivo: se malsana infano diras al sia patrino, ke ĝi fartas *pli bone* ol hieraŭ, tiu *pli bone* ne signifas, ke la infano fartas “bone”, sed nur pli “bone” (plu malbone) en rilato al la hieraŭa grado de *malbona* farto. Nur en tia kunteksto aŭ en tia situacio malsanulo povus eĉ diri la unuavide absurdan: “Mi fartas multe pli bone ol hieraŭ, sed *mi preferus farti bone ol multe pli bone*”. Sed tio neniel signifas, ke ekster tiaj kunteksoj oni povus egaligi en Esperanto la *malpli mal-* kun *pli mal-* *mal-*, en nia kazo *malpli malverŝajna* kun *pli verŝajna*, ĉar tio kondukus al ŝanĝo de la senco.

La frazo de D-ro Albault, kiun vi citas sur p. 116, ŝajnas al mi tute klara. Mi persone ne dirus, ke “-io duobligas la sufikson -ujo”, ĉar fakte ne temas pri “duobligo” de -ujo; mi preferus: “*paraleligas* la sufikson

-ujo", sed tio estas detaleta, ne tuŝanta la esencon de la demando.

Fine, ankoraŭ io. Vi prave skribis en via Rimarko (p. 116), ke la moto de Zamenhof "Por ke lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas nomi ĝin tia" ne estas korekte citita sur p. 413 (ne 412) de *Esperanto en Perspektivo*, ĉar tie aperas *universala* anstataŭ *tutmonda*. La koncernan ĉapitron verkis U. Lins kaj mi bedaŭras, ke kiel ĉefredaktoro mi pretervidis la eraron. Aliflanke, en ĉap. 2, verkita de mi mem, sur p. 35 la sama moto estas ĝuste citita.

Esperante, ke tiu ĉi letero estos publikigita en la sekvanta numero de Oomoto, mi restas kun bondeziroj por 1977 kaj koraj salutoj,

sincere via

Ivo Lapenna

×

×

×

Komentoj

Pravigi la nepravigeblan gramatike

estus io neebla krom per misinterpretado...

Lapenna verŝajne konsentas kun ni, ke la formo "ne pli ol" faras pozitivajn komparojn; sed ne pli. Laŭ li, tiu formo signifas egala al, aŭ eĉ malpli ol. Tiu difino aplikeblas nur al la okazoj, en kiuj la vorton *ol* sekvas la substantiva aŭ alia esprimo de *fiksita* mezuro, kalkulo, valoro k. s. Ekz-e, *ne pli ol 100 dolaroj* (= ne pli multe, aŭ ne pli granda sumo, ol 100 dol.) signifas malpli ol 100 dol. kun la ekstrema limo de "maksimume 100 dol." implicita. Al tiu kategorio de la relativa komparo per fiksa mezuro (kvantovorto k. s., aŭ ties ĉiaspeca anstataŭvorto) apartenas la jura esprimo, kiun Lapenna citis: "ne pli granda damaĝo ol la savita valoro". Ĝia senco estas tia, kiel li klarigis, kompreneble.

Sed tiu lia difino ne aplikeblas al la relativa komparo de agoj aŭ statoj, kiel en la Z-aj ekzemploj el "Hamleto" kaj la frazoj el "Ni kaj Ĝi", cititaj en mia studaĵo, ĉar, fakte, en la komparo de la agoj aŭ statoj rekoneblas nenia fiksa limo maksimuma aŭ minimuma, kaj sekve, ankaŭ nenia difinebla linio samgrada; kaj ĉar, retorike, kiel mi jam skribis, *ne pli* estas la ĉirkaŭdiro de "malpli", kiel *ne malpli* estas la litoto de "pli".

Ekz-e, *Mi trinkis ne pli ol vi* (trinkis), estas kvanto-komparo, ne la komparo de la ago *trinki* en si. Sed tiu frazo, kiel tia (t. e. sen kvantofiksa vorto post *ol*), ĝenerale signifas "mi trinkis malpli multe ol vi", sen konsidero pri limo maksimuma (= maksimume samkvante), ĉar tia limo ne ekzistas en tiaj komparoj. (Se tia limo, efektive, ekzistus en nia aktuala

trinkado, tio estas ekstergramatika afero.) Tial, se ni esprimus tiun komparon precizige, aŭ konformige, la sencon al la difino de Lapenna, ni dirus aŭ malimplice: *Mi trinkis tiom same (multe) kiel vi, aŭ malpli ol vi*, aŭ almenaŭ per enmeto de kvantovorto: *Mi trinkis ne pli ol kiom vi trinkis*.

Notindas, ke la imageblan, aŭ realan, linion samgradan povas esprimi precize nek “ne pli ol”, nek “ne malpli ol”, sola, sed nur ambaŭ kune: ne pli kaj ne malpli ol. “Mi trinkis ne pli nek malpli ol vi” = tiom same (multe aŭ malmulte) kiel vi = egalkvante kiel vi.

Konsentite, ke la frazo “Ŝi estas ne pli bela ol ŝia patrino” povus esti ironia. Sed tiukaze — ĉar laŭ ni, ĝi ne signifas, kiel Lapenna interpretas, ke “la filino estas same malbela kiel la patrino, aŭ eĉ pli multe ol ŝi”, sed ja, ke la filino estas malpli malbela ol ŝia patrino, — tial ni esprimus alimaniere. Se la filino estas same malbela, ni diros ironie: *Ŝi estas tiel bela kiel ŝia patrino*. Se ŝi estas pli multe malbela, ni diros ironie: *Ŝi estas ne malpli bela ol ŝia patrino*. Kiu povus tian duoblan sencon de ironio esprimi per unu simpla formo de komparo? Almenaŭ mi rezignas. Tamen, ĉe la proprasenca “ironia komparo”, aŭ komparo per si mem evidente ironia, ni povus interpreti, ekz-e: *Li komprenas predikon ne pli ol* (= same kiel, aŭ eĉ malpli ol) *bovo muzikon* (komprenas), ĉar la metaforo de ‘neeblaĵo’, esprimita en la *ol*-propozicio, mem rolas kiel ia absoluta fiksmezurilo en tia komparo.

La frazojn kun “ne pli ol”, kiujn mi citis el “Ni kaj Ĝi”, Lapenna rigardas pozitivaj komparoj, same kiel ni, sed komprenas kaj interpretas alie, ol ni. Ekz-e, li skribas, ke “la legantoj scias, ke W. rigardas la hipotezon de Paskalo ‘malverŝajna’, eĉ absurda”; kaj “ne povas esti dubo, ke la dua hipotezo *aŭ estas same malverŝajna kiel tiu de Paskalo, aŭ eĉ malpli malverŝajna*” (substrekita de T. N.). Atentu, ke tiu komparo pri malverŝajneco de du hipotezoj ne estas per si mem “ironia”, nek “kvanta” (ĉar troviĝas nenia fiksmezurilo), do la “ne pli” en ĝi estas nur la ĉirkaŭdiro de “malpli” (t. e. sen “same kiel”). Sed parte, ĉar li interpretas sendistinge la esprimojn kun “ne pli ol” ĉiam duoblasence, (vd. la ĵus substrekitan parton, k. m. a.), kaj parte pro manko de mia klarigo en mia artikolo, Lapenna rigardas tute eraraj miajn egaligojn: “ne pli malverŝajna = malpli malverŝajna = pli verŝajna”. La unua egaligo, laŭ ni, ĝustas, ĉar kiel jam dirite, la formo “ne pli mal~a, ol” (sen fiksmezurilo) ekskludas la unuan parton de lia interpreto: *same kiel*, kaj signifas *malpli mal~a, ol*. Do, pri la egaligo lasta restas fari iom da klarigo.

Se ni diras ekz-e, “A estas malpli malbela ol B”, senbezone diri, ke ankaŭ B estas malbela. Oni diras (gramatike), ke la du *mal-* en “malpli malbela” nuligas unu la alian, do, ni ricevas *pli bela* — kaj efektive, ĉar en la restriкта kadro en kiu ambaŭ estas malbelaj, se A malbelas malpli ol B,

A estas pli bela ol B, kiu tiam restrikta signifo: A estas (tiom) pli bela (kiom malpli malbela), ol B. Alivorte, A estas la pli bela el ambaŭ malbelaj. Sekve: malpli malverŝajna = pli verŝajna, t. e. la pli verŝajna el ambaŭ malverŝajnaj. Same ankaŭ pri la ekz-o montrita de Lapenna: “Li estas *malpli malalta*, ol alia viro” = li estas pli alta ol alia viro, t. e. la pli alta el ambaŭ liliputaj. Ne klaras por ni, en kia senco precize Lapenna uzas la formon *malpli mal~a*, sed unu afero estas sufiĉe klara: li ne kutimas nuligi la du *mal*-ojn, ĉar li insistas per detalado, ke *malpli malverŝajna/malpli malalta*, ktp. ne egalas al “pli verŝajna”/“pli alta”, ktp.

Lapenna citas kazon de malsana infano, kiu diras al sia patrino: “Mi fartas multe pli bone ol hieraŭ, sed...”. Tio estas perfekte komprenebla, per jenaj egaligoj kaj klarigoj: *Mi fartas* (ne pli malbone = malpli malbone =) *pli bone ol hieraŭ, sed mi preferus farti* [absolute] *bone, ol* [relative] *multe pli bone*. Se tiel la infano, fartanta plu malbone hodiaŭ, ja povas diri, “Mi fartas *pli bone*, ol hieraŭ”, kial do tiu, kiu estas hodiaŭ plu trista (= malgaja), ne povus diri, “Mi estas *pli gaja*, ol hieraŭ”? La argumento de Lapenna estas memkontraŭdira, ĉar la formon, kiun li lasas al la malsanulo uzi, li rifuzas al tristulo, dirante, “*malpli trista* certe ne estas *pli gaja*”, tamen pretervidante la restriktan signifon (korelativan) de tiu “pli gaja”: mi estas (tiom) pli gaja (kiom malpli trista), ol hieraŭ!

Sed kion mi pritraktis ĝis nun, tio estas unu flanko de la demando. La alia estas, ke Lapenna juĝas neniel pravigebla la kernan punkton de mia rimarkigo, ke la frazoj el “Ni kaj Ĝi” estas tipaj ekzemploj de la “negativa komparo”, vortigita laŭ la tipo de F, kaj li rigardas la tipon de tiaj frazoj “konforma al la spirito de Esperanto kaj perfekte komprenebla”, interpretante kelkajn kiel ironiajn komparojn (al kio ni propre ne kontraŭas, se temus pri evidenta ironio). Supoze, ke ili estas ironiaj, mi suspektas, ke pri “La dua letero ne estis pli respondita, ol la unua” li misinterpretas pli-malpli egale kiel pri “Ŝi estas ne pli bela ol ŝia patrino” (jam pritraktita). Ĉar la preciza signifo ankaŭ de la formo *ne malpli ol*, kiun li uzis (ĉi-supre) por interpreti tiun unuan frazon, ne estas tute klara por ni. Ĉu duoblasenca?

Ĉi tie mi demandus, kiel li esprimus tiujn laŭ li “ironiajn” komparojn *senironie*. Se esprimi ilin per *senironia* formo de komparo, tiu formo nepre estus de *negativa* komparo. Ĉu, tiam, la proprasenca “ne pli ol” por *negativa* komparilo taŭgus aŭ ne? Jen la demando, kiun mi levis, kaj provis pruvi ke ne, en mia artikolo (sed kiun li solvis alie, lasante nin demandi, kiel do li esprimus tion saman *negative*). Ekz-e, pri la jam menciita frazo 2: “En tia hipotezo, ne pli malverŝajna, ol tiu de Paskalo”, mi skribis, ke ĝi (ĉar mi juĝis ĝin esprimita per la negativ-kompara “ne pli ol” = *non plus que/no more than* k.s., kies ekvivalento simple ne ekzistas en

E-o) signifas “do ĝuste, kion ni esprimus per formo de negativa komparo egaleca: tiel ne malverŝajna kiel tiu de Paskalo = *tiel verŝajna kiel tiu de Paskalo*”. Pri tiu komparo kaj aliaj Lapenna, malaprobante tiujn miajn “egaligojn”, kontraŭmetis al mi siajn proprajn interpretojn kiel “perfekte kompreneblajn”, sed pro la kaŭzoj jam diritaj, li trafis aeron preter la celo de mia tezo, kaj mise eĉ la esprimintencon de la aŭtoro. Legu, kion Waringhien, la aŭtoro mem, skribas en sia letero al mi (supre).

Resume, tiel montriĝis, neatendite, ke la formon “ne pli ol” komprenas kaj interpretas malsame, kaj uzas diverssence ĉiu el la tri: unu Jugoslavo (en Britujo), unu Franco kaj unu Japano. Sed nun, Waringhien kaj mi jam plene konsentas pri tiu temo: li aprobis ĝenerale, kion mi atentigis, nome, ke la negativ-kompara “ne pli ol”, se enlasita en E-o, neeviteble puŝiĝus kontraŭ nia pozitiv-kompara “ne pli ol”, sed baldaŭ kun tiu fariĝus “falsa amiko”, tia, kiajn Lapenna prave asertas (ĉi-supre), ke “ni ĉiuj devas evitadi”. Tian “friponon” sub masko, kaj senmaskigitan, ŝajne ne rekonis Lapenna, kiu “tre atente” legis mian artikolon. Aŭ, kontraŭe, ĉu li mem ja tute pravas, tiel logike kiel praktike, en ĉiuj siaj argumentoj, tion mi lasas al la juĝo de la legantoj.

Ankoraŭ nur kelkajn vortojn. Se G. Waringhien, plej respektinda esperantologo kaj nia samtempulo, estus Esperantisto ne tre grandinflua por la nuna kaj estontaj generacioj, mi eĉ ne farus la zorgon kolekti kaj elmontri, kiel barbaro ĉasajn predojn, la kelkajn ekzemplojn de nur unu elemento frazturna, kiun en lia verko mi trovus “eratika”. Sed ĉar la fakto estas ja tute alia, mi trovis ĝin *sisteme* “erariga”, pesante ĝian sekvon el la lingvokultura vidpunkto kaj je “maksimuma internacieco de Esperanto” kaj je ĉies devo “gardadi kaj plu firmigadi ĝian unuecon”. (Tio ĉi cetere estus la motivo mem por la dua moto, kiun Lapenna — farante el nia escepte kaj specife grava kazo ian misjuĝan kaj malpropran specon de “ĝeneraligo” siaflanke — preskaŭ kondamnas en la enkonduka parto de sia letero.) Dum mi preparis la koncernan artikolon, mi kompreneble ĉiam tenis la okulojn kiel eble plej strikte — fermitaj al mia persona eraremo.

Fine, dezirindus disponi unu adekvatan formon por ebligi esprimi la apartan nuancon, kian Waringhien intencis per formo, kiu probable jam pruviĝis netaŭga en E-o. Ŝajnas malfacila elpensi unu fiksan formon komunan. Tian komparon pri “markizo kaj papo” (en la letero de Waringhien) mi provis per: *Pli malvere ke li estas markizo, ol ke mi estas papo; Pli malvere ke vi estas scienculo, ol ke mi estas stultulo*. La frazon 1: *Jam se la unua letero ne estis respondita, des pli ankaŭ la dua ne ricevis respondon*.

Al ambaŭ Profesoroj, miaj tre estimataj kaj karaj Kolegoj (en la Akd. de E-o) — mian plej koran dankon pro ilia tuja reago!

T. Nakamura

Okulaj Malsanoj (1)

La okulo estas la organo de la vidado, eble la plej delikata kaj sendube la plej alte taksita el ĉiuj homaj sensoj. Ĝi konsistas el tri esencaj partoj: 1e.) la retino, la plej interna el la tri okulaj membranoj, sur kiu formiĝas la bildoj; 2e.) la dioptra aparato (organo de la refrakto), kiu kondukas kaj kondensas la lumradiojn sur la retinan surfacon, konsistanta el refraktaj medioj de la okulo (korneo, antaŭkadero, pupilo, kristalino aŭ lenso kaj vitreo), kaj muskolo nomita ciliaro, situanta ĉirkaŭ la kristalino, kaj servanta al la akomodado; 3e.) la iriso, ronda, kontrahibla membrano, kun centra truo, la pupilo, por enlasi la lumradiojn, kiu limigas la kvanton da lumo atinganta la fundon de la okulo.

Krome estas akcesoraj aparatoj servantaj por movi la okulglobon (4 rektaj kaj 2 oblikvaj muskoloj por ĉiu okulo), kaj por ĝin protekti kontraŭ la eksteraj agantoj: 1e.) la skleroto, fibreca, netravedibla, blanka membrano, kiu konsistigas la ŝelon de la okulglobo, kaj estas, en sia antaŭa parto, en kontinueco kun la korneo, travidebla, refrakta membrano; 2e.) la palpebroj, du moveblaj membranoj, kiuj, proksimiĝante, kovras la okulglobon;

3e.) la larva aparato, konsistanta el glando sekrecianta larmojn, kies funkcio estas malsekigi la korneon kaj la konjunktivon (mukozo, kiu tegas la malantaŭan facon de la palpebroj kaj la antaŭan parton de la skleroto ĝis la kornea rando), kaj ekskreciaj duktoj, tra kiuj la ekscesaj larmoj estas forkondukataj al la nazkavo, kiu ankaŭ bezonas tiun humidon. La okulharoj en la rando de la palpebroj kontribuas al la ŝirmado de la okulo kontraŭ la troa lumo kaj la fremdaj korpoj. Plie la brovoj baras la vojon al la ŝvito de la frunto, kiu alie povus atingi kaj iriti la okulon.

La rilato inter la okulo kaj la tuta organismo estas tiel intima, ke la kuracisto (aŭ okulisto) devas ĉiokaze zorge konsideri la ĝeneralan sanstaton de la paciento.

La ĝeneralaj malsanoj, kiuj plej ofte kaŭzas simptomojn kaj malsanojn de la okuloj, estas: la sifiliso, la tuberkulozo, reŭmatismo, nefrito, diabeto, arteriosklerozo, koraj malsanoj, trofaj (prinutraj) perturboj, kronikaj toksigoj, malsanoj infektaj kaj de la nerva sistemo.

Escepte de la dormohoroj, la okuloj estas kontinue elmetataj al diversaj nocaj faktoroj: troa aŭ nesufiĉa lumo, trostreĉado, mik-

roboj, polvo, traŭmatoj, k. t. p.

Palpebraj malsanoj. — La plej oftaj estas: blefarito, hordeolo, kalazio (ĉalazio), trikiazo kaj traŭmatoj. Malsanojn, kiuj ĝenerale postulas kirurgiajn operaciojn, ni ne pritraktos (entropio, ektropio, blefaroftozo, tumoroj, k. t. p.).

Blefarito estas inflamo de la palpebra rando, tre ofta ĉe infanoj, sed ankaŭ konstatebla en ĉiuj aĝoj. Jen ĝiaj ĉefaj kaŭzoj: nefavora higiena medio, manko de pureco, kronika konjunktivito, perturboj de la larva aparato, maldormado, nebona korpa kondiĉaro, nekorektitaj refraktaj difektoj (precipe hipermetropeco kaj astigmatismo), irita atmosfero pro fumo, vento, polvo, k. t. p.

Ĝiaj simptomoj estas: ŝvelo, ruĝeco, doloro kaj jukado ĉe la palpebra rando, epiforo (larmelfluo), sensiveco al la lumo kaj okulalaciĝado dum laboro, speciale ĉe arta lumo. La palpebroj kelkfoje kungluiĝas matene, kaj prezentas grandan kvanton da blanketaj skvamoj ĉe la radikoj de la okulharoj. Tiuj ĉi ofte elfalas, sed estas anstataŭigataj per novaj. Ĉe ulcera formo la palpebra rando prezentas flavetajn krustojn, kiuj kungluas la okulharojn. Forigante tiujn krustojn, oni rimarkas ĉe la bazo de la okulharoj ulceretojn, kiuj facile sangas. La elfalintaj okulharoj ĉikaze ne estas anstataŭigataj per novaj, ĉar ties harfolikloj estas destruitaj. Sekve la palpebra rando prezentiĝas tute aŭ parte senhara.

La kuracado devas unue direktiĝi al la kaŭzo, kiu estigis la blefariton. Ĉiutage ĉe el-kaj enlitiĝo, zorge lavu la palpebran randon per vatbulo trempita en iom salita varma akvo aŭ en akvo kun iom da natria dikarbonato. Oni devas sufiĉe froti por forigi la skvamojn kaj krustojn; poste sekigu kaj pomadu per vazelino kun iktiolo je 5% aŭ per vazelino kaj lanolino miksitaj samproporcie, iom masagante. Ankaŭ utilas ŝmiri per pura olivoleo aŭ per pomado kun oleo el hepato de moruo, kiun oni povas forigi la sekvan matenon per iom da oleokalka linimento. Ĉe malnovaj kaj seriozaj kazoj necesas unue per forŝiro formeti la afekciitajn okulharojn kaj poste trakti la palpebran randon kiel ĉi-supre indikite. Por senkongesti la ŝveliĝintajn palpebrajn randojn apliku sur ilin 2-3-foje ĉiutage alternajn kompresojn varmajn-malvarmajn. Evitu laŭeble la artan lumon dum viaj labor- aŭ studhoroj, kaj faru ĉiutage okuln gimnastikon por fortikiĝi tiujn muskolojn. Racia nutrado, sunbanoj al la vizaĝo kaj al la tuta korpo, vaporbanoj al la vizaĝo kaj strikta observado de la ĝenerala higieno kompletigas la kuracadon.

Hordeolo (vorto derivita elde "hordeo", ĉar ĝi memorigas pri grajno de tiu cerealo) estas akuta inflamo de la palpebra rando centranta sur sebuma foliklo de okulharo. Ĝiaj ĉefaj simptomoj estas ruĝa ŝveliĝo, doloro, sensiveco, kaj poste la apero de flaveta punkto, kiu

indikas pusadon. Ĝi prezentiĝas en ĉiuj aĝoj, pleje ĉe infanoj kaj junuloj, kaj ofte ŝuldiĝas al mallakso kaj al refraktaj difektoj. Oni do devas trakti tiujn kaŭzojn, samkiel la ĝeneralan sanstaton de la paciento, kiel ĉi-supre indikite por blefarito, ofte kunestanta. Oni akcelos la maturiĝon de la hordeolo pere de varmaj fomentadoj, varmaj kataplasmoj el faruno de lingrajnoj aŭ el panmolaĵo kuirita en lakto. La okulojn lavu per iom salita akvo aŭ per infuzaĵo de kamomilo. Ĉe recidivoj, enstomakigu ĉiumatene, antaŭ la matenmanĝo, 1 aŭ 2 kuleretplenojn da sekigita bierfermentilo.

Kalazio prezentiĝas plejofte ĉe adoltoj. Ĝi estas malmola tumoreto pro inflamo de unu (aŭ pli) el la Mejbomaj glandoj, kiuj kuŝas laŭlonge de la palpebraj tarzorandoj (tarzo estas fibreca lameno, kvazaŭ skeleto de la palpebra rando). Ĝi adheras, ne al la haŭto, sed al la tarzo; iom iritas la konjunktivon kaj malbeligas la palpebron. Malofte ĝi spontanee malaperas. Kelkfoje ĝi pusas. En la komenco, kiam ankoraŭ malgranda, oni povas ĝin malaperigi pere de varmaj fomentadoj kaj masaĝoj. Kiam pli granda, nur la kirurgia operacio povas ĝin forigi.

Trikiazo estas denaska aŭ akirita devio de la okulharoj, kiuj skrapas la okulglobon kaj kaŭzas meĥanikan iritadon kaj lezon de la korneo kun kongesto, doloro, larmelfluo, fotofobio (lumtimo), k. t. p. Ĝia plej

ofta kaŭzo estas cikatra kuntiriĝo de la konjunktivo kaj de la tarzo ĉe trakomo. Aliaj kaŭzoj estas blefarito, brulvundoj kaj traŭmatoj. Kiam ne multenombraj, oni povas per forŝiro formeti la deviintajn okulharojn pere de pinĉileto. Sed ĉar post kelkaj semajnoj ili denove kreskas, oni devas ripeti tiun procedon ĉiam denove. Tial la elektra senharigo estas preferinda. Kiam ili estas multenombraj, kirurgia operacio povas esti necesa.

Traŭmatoj de la palpebroj (batoj, kontuzoj, brul- kaj pikvundoj, k. s.) estas tre oftaj. Ĉar la subhaŭta konektiva histo estas loza (malkompakta), aperas tiukaze ekimozoj kaj edemoj. La ekimozo, rezultanta de sanga enfiltriĝo en tiun histon, ne estas grava, sed ĝi malbeligas la vizaĝon dum 1 aŭ 2 semajnoj. Tuj apliku sur la regionon malvarmajn kompresojn aŭ mavarmajn kataplasmojn el argilo ofte renovigitajn. Post 1 aŭ 2 tagoj, anstataŭigu ilin per varmaj fomentadoj kaj mildaj masaĝoj por faciligi la resorbiĝon de la enfiltriĝinta sango. Ĉe pikvundoj fare de insektoj kaj brulvundoj, apliku prefere malvarmajn kataplasmojn el argilo; se tio ne eblas, malvarmajn kompresojn ofte renovigitajn. Ĉe brulvundoj ankaŭ utilas lavi tuj la palpebron per solvaĵo de natria dikarbonato; poste protektu ĝin ŝmirante oliv-, arakid- aŭ migdaloleon, aŭ pomadon el vazelino kaj lanolino proporci-egale, aŭ vakson.

Malsanoj de la larma aparato.

— La malsanoj de la larmoglando estas tre maloftaj. Male tiuj de la ekskreciaj duktoj estas tre oftaj.

Dakriocistito estas inflamo de la larmosako situanta ĉe la naza angulo de la okulo, kiun ĝenerale estigas obstrukco de la nazolarma dukto. Ĝia konstanta simptomo estas la epiforo (larmelfluo), kiu pliiĝas pro malvarmo, vento, polvo, fumo, k. s. Tiu regiono povas esti plena, ŝvela, kaj, se oni premas la disstreĉiĝintan sakon, elfluas tra la larmaj punktoj (du malgrandaj orificoj situantaj en ambaŭ palpebrorandoj je 6 milimetroj de la naza angulo) viskoza likvaĵo blank-, flav- aŭ verdeta, depende de la en ĝi enhavata puson. Tamen kelkfoje la sako malpleniĝas en kontraŭan ditekton, t. e. en la nazon. Ofte blefarito kaj kronika konjunktivito ekzistas samtempe; kelkfoje ankaŭ ekzemo. La dakriocistito, kronika malsano, kiu daŭras jarojn, prezentiĝas en ĉiuj aĝoj, kaj ne malofte ĉe novnaskitoj kaj infanetoj.

La kuracado devas unue direktiĝi al la kaŭzo de la obstrukco de la nazolarma dukto: rinito aŭ alia afekcio de la nazkavoj, nazaj polipoj, hipertrofio de la infra naza konko, k. t. p.

Sur la konjunktivon apliku salitan akvon aŭ infuzaĵon de alteo aŭ malvo aŭ ekvizeto aŭ rozpetaloj aŭ folioj de juglandarbo aŭ de eŭkalipto (moligaj kaj adstringaj plantoj). Malplenigu la larmosakon per premado kaj milde masaĝu ĝin por faciligi la enfluan en ĝin de la

kolirio. Alternaj kompresoj varmaj-malvarmaj, vaporbanoj al la vizaĝo, sunbanoj, kataplasmoj el argilo surloken kaj racia nutrado kompletigas la kuracadon. La sondado de la larmoduktoj, riska kaj ofte senefika procedo, devas kelkfoje esti farata nur de tre kompetenta specialisto. Kirurgia operacio estas akceptebla iufoje.

Dum la evoluo de kronika dakriocistito povas aperi akuta inflamo de la regiono de la larmosako, kiu finiĝas per absceso. La haŭto, kiu tegas la larmosakon, montriĝas ruĝa, ŝvelinta kaj malmola. La palpebroj kaj la konjunktivo partoprenas en la inflamo. Aperas ankaŭ doloro, sensiveco, iom da febro kaj malboniĝo de la ĝenerala sanstato. Post 2-3 tagoj oni rimarkas flavan punkton iom malsupre de la larmosako: temas pri formiĝinta absceso, kies disrompiĝo eliminis la kolektiĝintan puson. Kompreneble tiu elfluo tre mildigas la simptomojn. Koncerne la rezultantan fistulon, ĝi povas cikatriĝi aŭ persisti.

Por kuraci la akutan dakriocistiton en sia komenco, apliku varmajn fomentadojn aŭ varmajn kataplasmojn el faruno de lingrajnoj aŭ el panmolaĵo kuirita en lakto, kio akcelos la formiĝon de la absceso. Kaj poste apliku malvarmajn kataplasmojn el argilo ofte renovigitajn. Persistanta fistulo devas esti operaciita.

Malsanoj de la konjunktivo. —

Subkonjunktiva hemoragio okazas

sur la antaŭa parto de la okulglobo pro traŭmatoj aŭ ĉe maljunuloj, kies angioj havas fragilajn parietojn okaze de fortostreĉo, ternado, k. s., aŭ ĉe infanoj post atakoj de konvulsia tuso (kokluŝo). Ĝi ne gravas, kaj la sango resorbiĝas post 1 aŭ 2 semajnoj. Tamen oni faciligas tiun resorbiĝon milde masaĝante la afekciitan parton per la fingro sur la palpebro kaj aplikante poste malsekajn varmajn fomentadojn.

Konjunktiva hiperemio. — Ne-daŭra sanga kongesto en la konjunktivo okazas ofte pro fremdaj korpoj, polvo, vento, fumo, tro brila lumo (en plaĝoj, neĝo, k. s.), aŭ akompanas la akutan korizon kaj la fojnofebzon. Kronika formo rezultas el nekorektitaj refraktaj difektoj, devio de la okulharoj, fuma atmosfero, alkoholismo, trouzado de la okuloj, speciale ĉe nesufiĉa lumigado. Ĝi ankaŭ povas akompani la nazan kataron, blefariton kaj obstrukcon de la nazolarma dukto. La paciento plendas pri sekecsento, varmo kaj jukado, okula laciĝado, larmelfluo, lumtimo kaj palpebra pezeccento. La kuracado konsistas en forigado de la irita kaŭzo kaj korektado de la refraktaj difektoj. Krome lavu ofte la okulojn per akvo salita aŭ kun iom da natria dikarbonato, kaj apliku malvarmajn kompresojn.

Akuta konjunktivito manifestiĝas per ruĝeco, ŝvelo kaj sekreciaĵo pli-malpli abunda, muka aŭ mukopusa, kiu akumuliĝas dumnokte kaj sek- iĝas sur la palpebraj randoj dum la

dormohoroj. La paciento plendas pri jukado ĉe la palpebroj, kiuj ŝajnas al li varmaj, pezaj, kvazaŭ sableroj aŭ aliaj fremdaj korpoj troviĝus sub ili, doloro, lumtimo pli-malpli intensa kaj malklariĝo de la vidado, kiam sekreciaĵo metiĝas sur la korneon. Tiuj simptomoj pligraviĝas dumnokte kaj varias je intenseco laŭ la grado de la inflamo. Kelkfoje nur unu okulo malsanas ; sed pleje ambaŭ estas trafitaj.

La kaŭzoj de tiu inflamo, kiu povas ataki ĉiuagajn homojn, estas diversaj: 1) meĥanikaj: fremdaj korpoj, vento, polvo, fumo, k. s. ; 2) epidemiaj, ordinare dum printempo kaj aŭtuno, depende de atmosferaj kondiĉoj ; 3) infektaj pro kontakto kun fingroj, man- kaj viŝtukoj, k. s. infektigintaj per la kontaĝa sekreciaĵo de aliaj malsanuloj (tial oni ofte rimarkas plurajn afekciitojn en unu sama domo, lernejo, azilo, k. s.). Ne malofte ĝi ŝuldiĝas al morbilo, skarlatino, gripo, korizo, fojnofebro, k. t. p.

La plimulto de la pacientoj resaniĝas spontanee post kelkaj tagoj, aŭ 1-2 semajnoj. Tamen la naturkuracado povas mildigi la simptomojn, mallongigi la daŭron de la malsano kaj eviti ties pason al la kronika stato. Sendolorig- kaj seninflamigcele apliku sur la okulnan regionon malvarmajn kompresojn ofte renovigitajn dum 20 ĝis 60 minutoj, tri- aŭ kvarfoje en la tago ; kaj alian dum la tuta nokto. Lavu ofte la okulojn (pere de pilketo aŭ gutigilo aŭ vatbulo trempita en la

koncerna likvaĵo) per tepida abunda salita akvo (1 kulerpleno da salo solvita en 1 litro da akvo) aŭ per solvaĵo de natria dikarbonato (2 kuleretplenoj en 1 litro da boligita akvo) aŭ per infuzaĵo de kamomilo aŭ de sambukfloroj aŭ de malvofolioj je 20% (20 gramoj en 1 litro da akvo). Nokte ŝmiru la palpebrajn randojn per vazelino aŭ per olivoleo por ke ili ne kungluigu.

Kiam la kataro malpliigas, oni uzas kiel kolirion distilitan rozakvon 2 aŭ 3-foje en la tago. Kaj oni anstataŭigas la malvarmajn kompresojn per alternaj kompresoj varmaj-malvarmaj.

Por eviti la kontagion, oni strikte observu la plej skrupulan purecon. Man-, viŝtukojn kaj aliajn personajn uzaĵojn oni zorge lavpurigu kaj, se eble, boligu. (*daŭrigota*)

E N H A V O

- * Por Paco kaj Unueco, de Kiotaro Deguĉi 1
- * Fotoraporto pri la Kristana Soleno ĉe Oomoto 3~15
- * Sankta Aventuro, de D-ro Haĉiro Juasa 16
- * La signifo de nia Nova Alvokiĝo, de Dekano J. P. Morton 17
- * Gratulon pro la Kristana Diservo ĉe Oomoto, de S-ino Naohi Deguĉi 20
- * Azia Solidareco Fortikiĝas : ULBA en Nepalo kaj Hindujo 22
- * Mondocivitanoj kongresis en Kanazaŭa "Por certigi la ekzistadon de la homaro" 29
- * La Dua Mondokongreso de Mondocivitanoj "Por konstrui Mondokomunumon" 30
- * La Granda Invokado : La Preĝo de la Nova Tempaĝo, trad. el "Tri-anguloj" 32
- * Donacanta Mano, de Rolf Gelewski, trad. de M. G. Sobrinho 36
- * El la "Proverbaro", de Bertram Potts 39
- * Japanujo planis Kreadon de Juda Ŝtato, de Rabeno D-ro David Graubart, trad. N. Z. Maimon 43
- * La nokta entrudinto, de Shinichi Hoshi, trad. K. Matuba 46
- * Mankanta respekto, de D-ro Adolf Halbedl 49
- * Paco al la spirito de Paŭlo Balkányi, de Márton Fejes 50
- * Leteroj de Prof. Waringhien kaj Prof. D-ro Lapenna al la Aŭtoro de la "Negativaj Komparoj"; Komentoj, de T. Nakamura 51
- * Okulaj Malsanoj (1), de D-ro Jaime Scolnik 59
- * Esperantolibroj 28, 31, 45